

Revuo
ESPERANTO
Internacia

N-ro 598 (9) SEPTEMBRO 1955

Kongresa numero



**La urbestroj de Boulogne-sur-Mer kaj Bologna
proklamas en la Urbodomo la ĝemeliĝon de la du urboj**
Malantaŭe S-ino Malmgren kaj Prof. Lapenna

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Honora Redaktoro : HANS JAKOB

Redaktoro : R. ROSSETTI

39 Willows Cres., Birmingham 12, Anglujo

Telefono : Calthorpe 3340

Cion pri administrado de UEA kaj de la
revuo ESPERANTO, abonado, reklamoj,
anoncetoj sendu al
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

Traduko kaj represo de artikoloj estas
permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton.
Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

Jara abono (1955) : 15 ŝil. anglaj (kun
membreco kaj jarlibro 20 ŝil.)
Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj

Tarifo por reklamoj :
1 paĝo £6 ½ paĝo £3
¼ paĝo 30 ŝil. ⅓ paĝo 15 ŝil.

Anoncetoj pri korespondado :
2 pencoj por unu vorto aŭ 1 int. respond-
kupono por ĉiu duobla vorto
Legantoj en 80 landoj
Eldonnumero 6250



Enhavo

Gravaj decidoj de la Komitato. <i>I. Lapenna</i>	paĝo 241
La du flugiloj de Bolonjo. <i>R. Rossetti</i>	243
Kongresa rezolucio ..	254
Solena decido de la du Urbestroj	254
Kalocsay respondas ..	259
El la tradukoj de K. Kalocsay	262
Vagado sub palmoj. <i>J. Ribillard</i>	263
Alvoko de CED al geinstruistoj-esperantistoj..	267
Rubrikoj	
Tra la mondo esperantista	255
Esperantista vivo	268
Nekrologo	268
Radio-babiloj	269
Radio	270
Oficiala informilo	271
Internacia konkurso	272

Revuo

ESPERANTO

Internacia

N-ro 598

Septembro 1955



Gravaj Decidoj de la Komitato

Dum la ĵus okazinta Universala Kongreso en Bologna la Komitato kaj la Estraro de UEA kunsidis preskaŭ ĉiutage. La ampleksa tagordo de la Komitato postulis laboron en komisionoj. Nur dank' al tiu sistemo ĉio povis esti plenumita ĝustatempe. Jen la ĉefaj decidoj :

Post ĝenerala diskuto en la pleno de la Komitato pri la Raporto de la Estraro kaj pri la situacio de la Movado kaj de la Asocio, la Komitato ĉiuvoce aprobis la Raporton por la pasinta laborjaro.

La Dua kaj Kvara Komisionoj diskutis la Bazan Laborprogramon de UEA, publikigitan en la Junia n-ro de la revuo, kaj post kelkaj aldonoj rekomendis ĝin por akcepto al la Komitato. Tiu ĉi unuanime aprobis ĝin en sia lasta kunsido. Tiamaniere la Asocio nun posedas solidan fundamenton por siaj aktivecoj en la sekvantaj jaroj. Siavice la nova Estraro disdividis inter la Estraranoj kaj kelkaj Komitatanoj la laboron por la realigo de la unuopaj punktoj de la Programo. Pri la ero II/7 (Fakaj kongresoj kaj konferencoj) respondecas S-ro Llech-Walter ; pri la agado en Azio kaj

Afriko S-ro Tibor Sekelj ; pri kulturaj problemoj kaj aktivecoj D-ro Ivo Borovečki ; pri la kreskigo de la Asocio zorgos la Administra Sekretariino ; ĉiujn aliajn aktivecojn klopodos efektiviĝi la Ĝenerala Sekretario. La Prezidanto prizorgos la ĝeneralajn aferojn kaj la vicprezidanto, kiel ĝis nun, la landajn kaj fakajn asociojn. Krome, S-ro Mabelsoone respondecos pri la financaj kaj administraj aferoj.

La Komitato, plue, faris plurajn decidojn rilate la agadon ĉe Eŭropa Konsilantaro (Komisiito D-ro Herrmann en kunlaboro kun la Ĝen. Sekretario kaj S-ro Petit) kaj la enkondukon de Esperanto en la t.n. liberajn horojn de diverstipaj lernejoj. Estas ellaborita agadplano, pri kio ĉiuj landaj asocioj kaj la aliaj interesitoj ricevos ĝustatempe informojn kaj konsilojn.

Pro la fakto, ke la nova Statuto estas akceptita, estis necese adapti al ĝi la Ĝeneralan kaj Kongresan Regularojn. Pri tiu demando okupiĝis la Kvina Komisiono kaj ĝiajn proponojn aprobis la Komitato.

Tre ĝojiga fakto estas la aliĝo de novaj landaj asocioj al UEA. Jam antaŭ la Kongreso estis akceptita la

Germana kaj Finna landaj asocioj. En Bologna la Komitato akceptis tri pliajn: la Pollandan, Bosnian kaj Hercegovinan, kiel ankaŭ la Esperanto-Ligon de Nord-Ameriko. La aliĝo de 5 landaj asocioj al UEA en nuraj kelkaj semajnoj montras la kontentecon de la esperantistaro pri la laboro de la Asocio kaj signifas konsiderindan plifortiĝon de la internacia movado. La Komitato komisiis al la Estraro fari kontrakton pri kunlaboro en la senco de la par. 17 de la Statuto kun GEE, la franca geinstruista faka asocio.

La nova Estraro, elektita per sekreta voĉdono, konsistas el S-ro **E. Malmgren** kiel Prezidanto, S-ro **D. Kennedy** kiel Vicprezidanto, Prof. **I. Lapenna** kiel Ĝen. Sekretario, S-roj **Mabesoone** kaj **Llech-Walter** kiel Estraranoj. La konata poeto de la Skota skolo, S-ro **W. Auld**, estas elektita redaktoro de la *Revuo* ek de Novembro 1955, dum la ĝisnuna redaktoro, S-ro **H. Jakob**, estas ĉiuvoĉe elektita Honora Redaktoro. S-ro Reto Rossetti, kiu pro troa okupiteco ne plu povos funkcii kiel helpa redaktoro, ricevis la dankojn de la tuta Komitato pro la bonega laboro, kiun li faris en la pasinta jaro. Li redaktos ankoraŭ la Septembran kaj Oktobran numerojn.

La Komitato kaj la Estraro devis fronti gravegan administran problemon. Temis pri tio, ke la nuna Administra Sekretario, S-ro J. Rapley, esprimis la deziron ekŝiĝi el sia ofico la 1-an de Oktobro; plue, ke ankaŭ la nuna Kongresa Sekretario, S-ro M. Stuttard, ekŝiĝis el sia ofico; fine, ke laŭ la raporto de la Komisiono por vendo de la domo en Heronsgate kaj aĉeto de alia en Londono, montriĝis, ke ne estas eble trovi en mallonga tempo konvenan sidejon de la Asocio

en Londono. Aliflanke, evidentiĝis laŭ la informoj de la sama Komisiono (S-roj Gething kaj Holmes), ke estas praktike neeble trovi en Britujo geoficistojn, kiuj estus pretaj ekloĝi en Heronsgate. F-ino **M. Vermaas** estas nomita Administra Sekretariino kaj ŝi enoficiĝos plej malfrue la 1-an de Februaro 1956. S-ro **Figliera** estas nomita Konstanta Kongresa Sekretario ek de la 1-a Oktobro 1955. La Komitato decidis, en la senco de la par. 6 de la Statuto, malfermi novan administran oficejon en Rotterdam aŭ en Hago, laŭ la eblecoj. Ĝi komisiis al F-ino Vermaas trovi tiucele taŭgan ejon kaj la necesajn oficistojn por ekfunkciigi ĝin plej malfrue la 1-an de Februaro 1956. La Estraro havis plurajn kunvenojn kun la malnovaj kaj novaj geoficistoj por priparoli kun ili ĉiujn detalojn kaj atingi, ke ankaŭ en tiu ĉi transira periodo, de Oktobro ĝis Februaro, la Asocio kaj ĝia oficejo glate funkcii.

Estas necese akcenti, ke ĉiuj ĉi decidoj, elektoj kaj nomigoj estas faritaj aŭ ĉiuvoĉe aŭ kun 1-2 sindetenoj. Ĉiuj, inkluzive la geoficistojn, montris multe da helpemo kaj komprenemo, kio konsiderinde kontribuis al solvo de la demando. La Prezidanto esprimis la dankon de la Movado al la malnovaj Estraranoj, kiuj ne estis reelektitaj, kaj al la geoficistoj, kiuj ekŝiĝis. Lian deklaron la Komitato akceptis kun aplaŭdo.

Fine, la Komitato faris proponon de rezolucio, kiun la Kongreso akceptis dum la ferma kunsido, kaj elektis kiel Honoran Membron Prof. **Emanuel Fernández-Menéndez** pro la helpo, kiun li donis al nia reprezentanto dum la konferenco de UNESCO en Montevideo, precipe pro liaj meritoj rilate la aranĝon de la granda ekspozicio.

R. Rossetti

La du flugiloj de Bolonjo

La Bolonja Kongreso, kvazaŭ nobla aglo, sin portis supren kaj antaŭen per du potencaj flugiloj: jubileo kaj oficiala venko. De unu flanko la konscio pri Ora Jubileo de niaj universalaj kongresoj ekzaltis la korojn, kaj de la alia la elluktita sukceso ĉe Unesko impulsis la spiritojn. Retrospekto sur digne atingita etapo, kaj—perspektivo al novaj horizontoj.

Ĉu la aglaj flugiloj ankaŭ portis nin en tiun alton, kie regas pli mildaj temperaturoj? Certe estas, ke la timita somera varmego ne batis sur Bolonjon dum tiu semajno. Varmo, jes, sed ĉiam tolerebla kaj eĉ freŝigita de pitoreskaj fulmoj kaj pluvegoj je merkredo. Dum tiu interludo multaj el ni, vagantaj tra la urbo, estis dankaj al la gastamaj portikoj, kiuj ne nur ŝirmis nin de la rivere falantaj akvoj, sed eĉ permesis al ni plue promenadi laŭ nia celo.

La duobla distingo de la 40-a Kongreso estis akcentita inde kaj multloke en la programo. Ĉeestis pioniroj el la Unua Kongreso: S-roj Raffaele Bagnulo, Paul Nylén, D-ro Edmond Privat, S-ro Donald Searle; ĉeestis ankaŭ pluraj veteranoj el la

unua periodo, inter kiuj Hans Jakob (esperantisto de 1905), Prof. Fernández Menéndez (de 1908) kaj Teo Jung (de 1910). La du urbestroj de Boulogne kaj Bologna, kiuj tiel digne kaj pozitive partoprenis la aranĝojn, estis por ni vivaj simboloj de la etapo atingita. Nia Prezidanto, S-ro Malmgren, komencis sian malferman paroladon per vortoj de Zamenhof el la Unua Kongreso, kaj indan finon donis al la okazo la *Jubilea Rapsodio* je la vendreda vespero. Pri Montevideo prelegis kun sonbendo Profesoro Lapenna, kaj la tuta labora flanko de la Kongreso marŝis sub la signo de oficiala rekono al novaj kaj kuraĝaj celoj. Tradicio kaj progreso: jen la du devizoj, kiuj animis la 40-an, la Jubilean Universalan Kongreson de Esperanto.

INTERKONATIĜA vespero

Pardonu, sed mi preferas ankoraŭ la plenan formon anstataŭ la elipsa, kiu ŝajne sufiĉas por multaj rapidemaj spiritoj!—La I.V. okazis, tre konvene, en la altaj sferoj de la feliĉo, sur la monteto nomita “Sepa Ĉielo”: agrablega teraso en mezo de la urbo,

La Komitato kaj la Estraro havas firman volon konduki Esperanton al novaj, grandaj sukcesoj en la sekvantaj jaroj, sed ambaŭ organoj konscias, ke nenio estas atingebla sen sindona laboro de niaj landaj asocioj, niaj grupoj kaj ĉiu unuopa esperantisto. Tial kaj la Komitato


kaj la Estraro direktas al la esperantistaro de la tuta mondo varman alvokon harmonie kunlabori por la bono de nia komuna afero, fortikigi la Esperanto-organizaĵojn, precipe UEA, kaj evoluigi novajn aktivecojn laŭ la ideoj de la Baza Laborprogramo.

I.L.

kun lageto kaj promenejoj kaj randita per faskoj da lumgloboj, kvazaŭ oranĝarboj. Ni atingis la Sepan Ĉielon per pompaj, larĝaj ŝtuparoj kaj celis kompreneble al la celo, la trinkejo : granda ejo, tamen ankoraŭ malgranda kiam temas pri 1700 personoj samtempe. Oni kunprem-igis kiel haringoj en barelo ; se oni havis bonsorton oni atingis trinkon aŭ glaciaĵon ; se oni estis tre energia oni kredeble ankaŭ sukcesis sin puŝi de loko al loko por trakonatiĝi kun aliaj ; sed la pliparto ankris tie, kie ili sin trovis, sidante aŭ starante, kaj kontribuis al la vigla bruo, kiu tramuĝis la ejon, per sia propra plenpulma kontribuo. Cetere regis gajo kaj bonhumoro kaj nenio malhelpis, ke diversaj anoj migru al proksimaj trinkejoj post sata gustumo de la universala atmosfero sur la Sepa Ĉielo. Kaj tiel la festo daŭris entuziasme ĝis noktomezo, se ne pli.

Ĵurnalista konferenco

Ni resaltas tri horojn por noti la sukcesan ĵurnalistan konferencon okazintan en Hotelo Bologna vendredon posttagmeze. Al reprezentantoj de urbaj kaj landaj ĵurnaloj parolis unue nia Prezidanto (tradukis S-ro U. Broccatelli) kaj poste Prof. I. Lapenna en itala lingvo. Oni tuŝis la esencon de Esperanto kaj de la nuna kongreso, kaj la signifon de nia atingo ĉe Montevideo. Venis multaj demandoj, lerte responditaj de Prof. Lapenna kaj de S-ro G. C. Fighiera, la juna estro de la Gazetara Servo (kiu, cetere, funkciis eminente bone ĉe la nuna kongreso). S-ro Fighiera jam forte impresis per sia trankvila kaj fortika teniĝo. Al ĉiu demando li respondis flue kaj trafe. Tie oni konstatis sur junaj ŝultroj bone ekipitan menson aligitan al matura temperamento kaj al spirito preta



La Urba Teatro dum la Solena Malfermo

kaj neŝancelebla. Ĉio tio bone aŭguras al li por lia nova posteno de Konstanta Kongresa Sekretario.

La Inaŭguro

Estas malfacile imagi pli dignan kadron por nia granda soleno, ol la Urba Teatro de Bolonjo. Temas pri grandioza amfiteatro pompe elkonstruita laŭ eleganta renesanca stilo, kie la ĉefa kolorimpreso estas eburo kaj ruĝa pluŝo. Ĉirkaŭ la vasta parteroj altiĝas vico super vico da luksaj loĝioj: en kvin etaĝoj, se mi bone nombris. Tutlarĝe antaŭ la podio pompis diboĉa belo de gladioloj; ĉe la fono staris vico da palmoj, gracie dekorantaj la malsupran randon de la grandega kongresa standardo. Teatraj lampoj diverskoloraj diskrete prilumis el tri flankoj la eminentan anaron sur la podio. Ambaŭflanke apud la kulisoj oficistoj en parada uniformo tenis la standardojn de Boulogne-sur-Mer kaj Bologna, kaj apud nia Prezidanto, S-ro Malmgren, sidis la du urbestraj moŝtoj, S-ro **Giuseppe Dozza** de Bologna kaj lia gasto S-ro **Héguenette** de Boulogne-sur-Mer.

Parolante Esperanton, la Urbestro de Bologna solene inaŭguris la 40-an Jubilean Kongreson de Esperanto. Jen resumo de lia parolado.

Antaŭ ĉio, la oratoro esprimis sian dankon plej koran al la organizintoj pro la fakto ke ili elektis la emilian ĉefurbon kiel sidejon de la kongreso. Jam de la nacia itala Esperanto-kongreso en 1952, la urba konsilantaro de Bologna ĉiam helpis nian movadon ĉar nenio estas pli nobla ol agado kiu, havante la celon unuigi la popolojn kaj forigi lingvajn miskomprenojn, fariĝas tre efika ilo de paca kaj internacia amikeco. Pro

tio li povis aserti, nome de ĉiuj urbanoj, ke Bologna, nature gastama urbo, estas fieri akcepti la tutmondajn batalantojn por la paco. Li esprimis, konklude, sian konfidon pri plena sukceso de la universala kongreso, kiu okazas en internacia momento bonŝance aŭspicia por ĉiuj pacaj homoj.

La franclingvan saluton de S-ro Héguenette tradukis S-ro Petit. S-ro Héguenette esploris la komunan fonton de la du urbonomoj en la frua historio, kaj akcentis la idealisman kontinuecon inter la Unua kaj la Jubilea Kvardeka universalaj kongresoj.

Sekvis sur la podio la reprezentantoj de 15 registaroj, nome: Aŭstrujo, Belgujo, Brazilo, Danujo, Finnlando, Francujo, Germanujo, Izraelo, Italujo, Norvegujo, Novzelando, Nederlando, Svedujo, Urugvajo kaj Venezuelo. La ŝtatministro pri Publika Edukado estis oficiale reprezentata de Prof. Giorgio Canuto, Rektoro de la Universitato en Parma. S-ro Petit, nia komitatano el Francujo, reprezentis ĉe la Kongreso S-ron Guy Mollet, Prezidanton de Eŭropa Konsilantaro.

Poste salutis oficiale la komisiitoj de jenaj landaj Esperanto-asocioj: Aŭstralio, Aŭstrujo, Belgujo, Brazilo, Britujo, Ĉinujo, Danlando, Egiptujo, Finnlando, Francujo, Germanujo, Hispanujo kaj Kanariaj Insuloj, Italujo, Jugoslavio, Maroko, Nederlando, Norvegujo, Novzelando, Sardinio, Svedujo, Svislando, Urugvajo, Usono, Venezuelo.

Stariĝis nia Prezidanto, S-ro **Ernfrid Malmgren**, por saluti la Kongreson per inaŭgura parolado:

“Estimataj sinjorinoj kaj sinjoroj, mi salutas vin, karaj samideanoj, fratoj kaj fratinoj, el la granda tut-

monda familio, kiuj kunvenis el landoj proksimaj kaj malproksimaj, el la plej diversaj regnoj de la mondo, por frate premi al si reciproke la manojn pro la nomo de la granda ideo, kiu ĉiujn nin ligas.

“Per tiuj vortoj D-ro Zamenhof bonvenigis la kongresanojn en Boulogne-sur-Mer en 1905 okaze de la unua Universala Kongreso de Esperanto. En tiu ĉi Jubilea Kongreso, ĉar forpasis 50 jaroj, mi per la samaj vortoj bonvenigas vin.”

S-ro Malmgren salutis la pionirojn kaj veteranojn de nia afero, ĉeestantaj kaj ankaŭ ne-ĉeestantaj. Li solene revokis ankaŭ la memoron pri la forpasintaj batalantoj por la ideo de internacia lingvo kunfandanta la homaron: pri nia majstro Zamenhof kaj multaj miloj da aliaj pioniroj, nun kuŝantaj en sia lasta dormo. Per mallonga silento la ĉeestantaro honoris ilian memoron.

Dum tiu ĉi kongreso niaj pensoj estis ankaŭ ĉe multaj en diversaj landoj, kiuj ne povis ĉeesti kun ni, sed kiuj konigis al ni, pere de kongresantoj, sian varman saluton kaj spiritan partoprenon en niaj laboroj.

S-ro Malmgren skizis refere la progreson de nia afero dum la pasintaj 50 jaroj: la intervenon de du mond-militoj, la unikan rolon de D-ro Edmond Privat ĉe Ligo de Nacioj kaj Tutmonda Poŝta Ligo por la agnosko de nia lingvo, kaj laste la fruktodonan laboron ĉe Unesko de D-ro Lapenna, Prof. Fernández Menéndez kaj la granda roto de helpantoj ĉiulandaj. Li atentigis pri la granda laboro ankoraŭ farota kaj pri la fortoj de reakcio kaj memintereso, kiuj daŭre nin oponas. Tiuj similas al “karteloj de ĉevalposedantoj, kiuj per ĉiuj rimedoj kontraŭas la uzadon de vaporforto aŭ elektra forto, por ke



*Prezidanto Malmgren
malfermas la Kongreson*

Fone: Prof. Canuto kaj S-ro Nylén

ili daŭre havu bonan profiton de siaj ĉevaloj.”

Ni mem estas la solaj fakuloj pri nia lingvo. “Alvenis la tempo, kiam ni devas fari niajn postulojn. Estas la postuloj de popolo, de Esperanta popolo, vivanta popolo, celkonscia popolo!—Karaj reprezentantoj de tiu esperantista popolo, estu bonvenaj en nia Jubilea Kongreso.”

Longe sonis la aplaŭdoj.

Poste S-ro Kavaliro **G. Zacconi**, Prezidanto de LKK, alportis sian saluton kaj bonvenigon al la kongresanaro. (Lian altan staturon kaj imponan kapon kun la leonaj kap-haroj mi ofte vidis dum la semajno, kaj ĉiam kun la penso: “Jen ĝusta modelo por Epstein!”)

La festparolado de D-ro **Privat** brilis per lia simpatia personeco kaj trafa, hom-al-homa sincero. Li parolis pri la freŝdata konferenco de la “kvar granduloj” en Ĝenevo, kaj pri la angoro, kiun oni sentis pri la eventualo de iliaj intertraktoj, ĉu ili

hazarde atingos akordon, aŭ ĉu ili subite “ĵetos sur nin la ĝeneralan mortigon”? Li parolis pri tiuj sinjoroj, kiuj “ne kuraĝas tagmanĝi, ne havante post sia dorso interpretiston” kaj li kontrastis tion kun la senbara interkompreno ĝuata de la ĉiulandaj parolantoj de Esperanto. Kaj tamen oni bonvolas nin malŝati: oni liveras al ni, per la vortoj de Hamleto, *la malestimon, kiun seninduloj regalias al merito efektiva*. Tamen jam en la jaro 1905 oni povis pli juste taksi. Tiam en Parizo D-ro Zamenhof tagmanĝis sur Ejfel-turo kun 15 membroj de la Franca Akademio, kiuj perceptis en tiu modesta homo la kvalitojn de genio. Dank’ al Zamenhof Esperanto estas pli, ol nura lingvo-komprenilo: ĝin animas kaj motoras la *interna ideo*: io potenca, kvankam nedifinebla. La ĉina filozofo Lao-Tze diris, ke “La afero difinebla ne estas la vero; la afero videbla ne estas la vero; la afero aŭdebla ne estas la vero”. La vero estas pli profunda kaj pli ampleksa, ĝin oni sentas, sed ne povas adekvate priskribi. Tia estas la interna ideo de Esperanto.

Ankoraŭ multe restas farota. Necesas organizi pli kaj pli teknikajn konferencojn por pruvi, ke la esperantistoj parolas ne nur pri Esperanto. Trans la abismon, kiu dividas la homojn, genia arkitekto konstruis la gracion, mallarĝan ponton, Esperanton. Ni, kiuj pasas sur ĝi, povas rigardi en la abismon kaj vidi la skeletojn kaj kraniojn de la viktimoj de l’ malamo kaj miskompreno. Tiun maldikan ponton ni uzos kaj ni ĝin persiste pligrandigos. Kaj dume nin ne tuŝos la vantaj mokoĵoj de la malŝatantoj. “Bojas la hundo, sed pasas la karavano ankoraŭ!”

La granda teatro eĥis de aplaŭdoj je la inspira parolado de nia honorinda pioniro.

La Inaŭguro finiĝis per la fervora kantado de la Himno.

“Via Lodovico L. Zamenhof”

De la Inaŭguro oni iris al la solena dediĉo de Strato Zamenhof en nova kvartalo de la urbo. Iris la urbestroj de Boulogne kaj Bologna kaj granda nombro de kongresanoj per specialaj aŭtobusoj. Solene oni malvualis la ŝildon: *Via Lodovico L. Zamenhof, creatore dell’ Esperanto*. Al la



Urbestro Dozza oficiale inaŭguras Straton Zamenhof

parolado de la urbestro (tradukita de Prof. Canuto) respondis nia Viceprezidanto S-ro Kennedy. Je la fino S-ro Dozza pendigis florkronon sub la ŝildo.

Laboro

La laboroj de la Kongreso velis antaŭen sub la konkorda puŝo de du ventoj: la nova statuto (akceptita per granda plimulto) kaj la same akceptita baza laborprogramo. Oni laboradis febre kaj fervore, en kun-sidoj de Estraro kaj Komitato, en specialaj komisionoj kaj en tri ĝeneralaj kunvenoj. Pri kelkaj fruktoj de tiu laboro informas nia Ĝenerala Sekretario en la enkonduka artikolo de ĉi tiu numero.

La nepo nin benas

Inter la gravaj saluttelegramoj ricevitaĵoj de la Kongreso estis unu de la Prezidanto de la Itala Respubliko, unu de S-ro Guy Mollet, Prezidanto de Eŭropa Konsilantaro, kaj unu de Ludoviko Zamenhof en Varsovio, la nepo de nia Majstro.

Saluton sendis ankaŭ Generalo Bastien, kaj S-ino Haudebine alportis la saluton de la Ĉeĥoslovakaj esperantistoj.

Diservoj

Dum dimanĉo okazis diservoj katolika (en preĝejo S. Giacomo) kaj evangelia (en Via G. Venezian). Hebreaj esperantistoj estis ankaŭ invitataj al 4 diservoj en sinagogo Via Mario Finzi. Ĉi tie mi mencias ankaŭ la solenan dediĉon, je mardo 2-a de Aŭgusto, de fundamenta ŝtono por preĝejo je nomo de Sankta Papo Pio X. La vortoj de Pio X estis rememorataj ankaŭ okaze de omaĝo al lia Eminentia Moŝto la Kardinalo Jakobo Lercaro: *“Mi vidas en Esperanto valoron por konservi la unuecon inter la popoloj. Esperanto havas antaŭ si grandan estontecon.”* Tiu soleno estis plej bela kaj impona. Parolis Pastroj M. Carolfi kaj E.

Circelli kaj kantis ĥoro kaj vico de unuarangaj kantistoj. Lia kardinala moŝto alparolis kaj benis la kunvenon kaj aparte li benis (ĉe peto de Karlo Minnaja) la denaskajn esperantistojn.

Pri **Bolonjo** mem — ho ve! — mi povas malmulton rakonti. Tion mi lasos al aliaj, malpli okupitaj kongresanoj. Mem mi faris nur unu specialan viziton: al la pinakoteko, kie mi vidis riĉan kaj ravan kolekton de gotikaj freskoj kaj tempraj pentraĵoj, poste unu Rafaelon, unu Ticianon, unu Tintoretto'n, du trasantaj observemaj portretoj de Guido Reni (mirinde liberaj je la karakterizaj sentimentalaj kaj barokeco de tiu pentristo) kaj kelkajn hektarojn da pentraĵoj de la familio Caracci. Ankaŭ la ekskursojn mi signos nur per malgranda noto: mi mem iris al Venecio, kaj restis tute sorĉita de la Reĝino de l' Adria maro. Mi aŭdis ke tiuj, kiuj veturis al Ravenna, fartis eminente, ne nur vidinte (kompreneble) la grandiozajn mozaikojn, sed ankaŭ estinte akceptitaj kun riĉa regalo de la gastama urbestro.

Internacia Somera Universitato

La ISU okazis sub la honora protekto de Prof. **Felice Battaglia**, rektoro de la Universitato en Bologna. Proksimume 500 kongresanoj ĉeestis la inaŭguron en la Urba Teatro sub prezido de la Rektoro, Prof. **G. Canuto**, kiu ankaŭ faris la unuan prelegon: *Kiel la mortintoj povas helpi al la vivantoj.* La oratoro konturis la historion pri la uzado de homaj kadavroj por sciencaj celoj kaj montris kian helpon tiuj mortintoj alportis al la evoluado de anatomiaj konoj kaj konsekvence ankaŭ de fiziologio, patologio k.a. branĉoj de la medicino. Hodiaŭ la mortintoj

ankoraŭ helpas, cedante partojn por greftado al vivantoj, ekzemple la korneon de la okulo. Sed por tio necesas, ke la kadavro estu freŝe mortinta, kaj la leĝoj malpermesas sekci tiel frue post la morto. Entute la problemo estas ne nur leĝa sed ankaŭ morala, kaj postulas novan orientiĝon de penso pri tiuj aferoj.

Sekvis prelego de Prof. **I. Lapenna** pri *La Eŭropa Konsilantaro kaj la ideo de Eŭropa Federacio*. La preleganto ekzamenis la projektojn por Eŭropa komuna registaro kaj

tempaj kunvenoj je la 9-a, kaj denove 5 samtempe je la 10-a. Poste je la 10-a kaj 11.45-a okazis nur po unu kunveno. Oni antaŭsentis, ke tia distribuo ne povos resti, kaj fakte okazis transŝovo de almenaŭ ses prelegoj kaj kunvenoj al aliaj tempoj aŭ lokoj. Tio kaŭzis, ke multaj kongresanoj ne informiĝis ĝustatempe pri la ŝanĝoj kaj maltrafis kunvenon, kiun ili deziris viziti.

Prelegis je lundo Doktoro Prof. **Ivo Lapenna** pri la temo *Esperanto antaŭ UNESKO*. Laŭ la postulo de la publiko, ankaŭ samideano Prof. **Fernández Menéndez** devis ascendi la podion kaj sidiĝi apud la preleganto, kiu kelkfoje memoris



Popolkostumoj ĉe la Balo

Foto de S-ro Tadros Megalli

skizis la celon kaj strukturon de Eŭropa Konsilantaro. Rilataj temoj estas la ekonomia kunlaborado (karbo-ŝtalo unio) kaj milita unuiĝo (eŭropa armeo). Fine la oratoro konkludis, ke nur plena, efektiva unuiĝo en formo de federacio povas esti la plej bona solvo de nuntempaj malfaciloj en ĉiuj internaciaj rilatoj.

La kongreso estis aparte riĉa en prelegoj. Al la 11 prelegoj de ISU aldoniĝis ankoraŭ 3 kulturaj prelegoj. Kune kun ĉiuj fakkun-sidoj kaj aliaj aranĝoj tio aŭguris pezan programon, kaj enrigardo en la kongreslibron efektive montris strangajn aglomerojn de samtempe okazantaj kunvenoj. Ekzemple marda mateno komenciĝis per kvin sam-

signifajn kaj gravajn meritojn de li kaj de aliaj montevideaj samideanoj. Doktoro Lapenna en sia konata altstila kaj oratora maniero prezentis al la aŭskultantoj ĉiujn plej gravajn agojn, momentojn kaj emociojn kiujn li travivis dum sia pasintjara restado en Montevideo, kie li sukcesis kun streĉa batalo ke UNESKO akceptu rezolucion por Esperanto. La oratoro interrompis la prelegon kaj ekfunkcigis elsendon de la sonbendo. Tiel oni aŭdis paroladon de la meksikia delegito kiu dufoje proponis favoran rezolucion, la bruon tra la salono, sonoradon de la prezidanto, paroladon de la angla delegito kaj proklamon de la favora voĉdonado. La preleginto finis la prelegon

Aŭdite. Post la prelego *Kiel la mortintoj povas helpi al la vivantoj*: “Nun estus interese aŭskulti prelegon: Kiel la Akademio povas helpi al la esperantistaro.”

asertante ke la UNESKO-rezolucio larĝe malfermis la pordon al propagando de Esperanto, sed de esperantistoj mem dependas ĉu ili saĝe kaj utile eluzos tiun agadon.

La vizito al la supra prelego estis tre granda, kaj la entuziasma publiko ofte interrompis la oratoron per aplaŭdegoj dum la streĉa rakonto.

Prof. **Lucien Laurat** disvolvis la temon *Socistrukturoj kaj proprajtipoj*, donante larĝan perspektivon tra la historio, komence de individua aŭ familia posedo de laboriloj, tra sklaveco, servuteco (feŭdismo) kaj diversaj stadioj de kapitalisma evoluo, kun indiko pri la respektivaj sociaj strukturoj. Lektoro **J. H. Rosbach** karakterizis en sia prelego *Greka mitologio kaj greka religio* la helenajn gediojn kaj iliajn historiojn, kiuj fariĝis klasika kaj ĉiam sorĉanta temo por verkistoj en ĉiuj epokoj. Diplomito **I. Rotkvić** en sia prelego *Lingvo kaj literaturo* prezentis tezon kontinue rezonitan kaj riĉan je baza originala pensado. Li skizis la evoluon de lingvo por hombezonoj praktikaj kaj spiritaĵoj. Logiko estas tro malvasta kiel tuta bazo por lingvo-esprimado: partoprenas ankaŭ la esprimbezonoj de psiko, emocio kaj persona vizio. Simile la kategoriado de lingvoelementoj laŭ substantivoj, verboj ktp (laŭ ortodoksa gramatismo de hindeŭropaj lingvoj) ne bone respondas al la realoj de viva lingvouzo. La preleganto plue konsideris la lingvajn fenomenojn de poezia kaj proza kreado, kaj konstatis, ke Esperanto estas same natura lingvo kiel ĉiu nacia lingvo kaj ĝia literaturo estas same nature vivanta kiel tiuj en la naciaj lingvoj.

Lic. **Tibor Sekelj** kun lumbildaj ilustroj priskribis la *altan civilizon de la Maja-indianoj*. Li mem faris apartajn esplorojn pri tiu detruita civilizo, kaj li mirigis la ĉeestantojn per la alta evoluo de matematiko, de astronomia scienco, de arto kaj kulturo, ĉe tiu mezamerika popolo. Estis interese ekscii, ke ni dankas al la majaoj tri vulgaraĵojn manĝaĵojn de nia epoko: la maizon, la terpomon kaj la tomaton (se mi ĝuste notis en la mallumo ĉe lia prelego!). Prof. **H. Sirk** elektis la temon *La ultrasono*, kiun li eksplikis kun sia karakteriza, zorga klaro, helpante al si per lumbildoj kaj filmo. La prelego de lektoro **Josip Vrančić**, *Strindberg en jugoslaviaj tradukoj*, havas por la esperantistoj apartan intereson, ĉar ankaŭ ni vive

okupiĝas pri kulturperado, precipe inter la negrandaj nacioj. Sur larĝa fono de historio kaj socia evoluo, S-ro Vrančić prezentis detalan kaj ampleksan studon pri la konigo de la sveda geniulo al la jugoslaviaj popoloj.


Nia poeto D-ro **V. Musella** faris du prelegojn, ambaŭ kulturriĉajn kaj ĝudonajn: *la itala renesanco kaj la poemoj de Giovanni Pascoli*. En la unua li entreprenis grandan temon, kiun li tramontris kompendie, kun emfazo al la literaturo, sed tuŝante ankaŭ la vidajn artojn. La dua temo ebligis al la preleganto pli detalan traktadon, kaj ĝin li komunikis kun verve kaj infekta entuziasmo. Mi iom bedaŭris nur tion, ke li prezentis la belan lirismen de Pascoli nur per prozaj tradukoj. Tio lasas ion deziri. Ĉe poemo la formo estas ja parto de la senco. Mi do atendis, ke D-ro Musella uzu la bonajn vers-tradukojn de Ing. G. Azzi, aŭ ke li proponu proprajn tradukojn forme fidelajn. Alia kultura prelego estis tiu de S-ino Clelia Conterno Guglielminetti pri la itala literaturo—tiu bela manifestacio, kiu estis ne nur grava en si mem, sed kiu ankaŭ havis vastan kaj profundan influon sur la samtempe kaj poste evoluintajn literaturojn de Eŭropo.

Lektoro **R. Rossetti** havis la agrablan taskon montri antologion de diversskolaj pentroverkoj per koloraj lumbildoj. Li iom domaĝis multe komentarii la belajn bildojn, sed ekzistas ja tradicio (kiun li ne volis rompi), ke preleganto dum prelego devas konstante agiti la aeron.—Artverko estas persona travivaĵo por ĉiu, kaj Rossetti celis per sia komentario alkonduki la ĉeestantojn al la vizio de la artisto, por ke ĉiu trovu en tio ion persone valoran.

Laste en ISU prelegis Prof. **G. Waringhien** pri la *Esperanta leksikologio*. Tre interese li prilumis la fariĝon kaj signifon de la *Universala Vortaro*, la historion de ĝia fundamenteco kaj la karakteron kaj formon de la radikoj, kiuj ofte estis originala kompromiso inter la formoj en du diversaj nacilingvoj. Daŭrigante, la preleganto konturis la evoluon de la vorttrezoro kaj la devojn kaj problemojn de la vortaristo. Dum la kongreso oni anoncis, ke publikiĝis dua kajero de ISU-prelegoj, kaj se tiu havos moderan vendosukceson, oni sekvos per plua volumo el lastatempaj prelegoj. Ni varme esperas, ke tio ĉi efektiviĝos, kaj ke en tiu plua volumo troviĝos la valora prelego de Prof. Waringhien kune kun pluraj aliaj el la Bolonja ISU.

La Revizoro

Estis grandioza ideo revivigi la tradicion de la fruaj kongresoj per la prezentado de teatra mondv verko. Mi venis al la urba teatro pensante, kiel do la itala trupo interpretos la slavan animon de Gogol kaj liaj figuroj? Miaj duboj estis vanaj, ĉar la aktoroj, kvankam nur lernantoj de sep monatoj, donis tute profesian prezentadon, pri kiu ili povas fieri, kaj por kio ili kaj la talenta reĝisorino, F-ino Norma Zacconi, estas forte laŭdindaj. Estas vero, ke ofte la voĉoj ne estis plene elĵetitaj por esti ĉie bone aŭdeblaj; sed tion kompensis en tre granda parto la elokventeco de la gestoj kaj movado tra la sceno, dank' al kio la tuta irado de la historio estis



La falsa revizoro amindumas indiferekte kun la filino kaj edzino de la urbestro

tute klara, eĉ malgraŭ la ne plene kaptitaj vortoj. Cetere oni havis impreson, ne pri Esperantaj lernantoj, sed pri personoj parolantaj flue kaj senpere, kun ĉiuj nuancoj de spontana esprimado, sian denaskan lingvon. Ni tutkore gratulas kaj esperas, ke la

iniciaton, tiel brile komencitan, oni daŭrigos en estontaj Universalaj Kongresoj. Kion ni vidos en Kopenhago? Jolanto? Peer Gynt?

Urbestra akcepto kaj balo

Je mardo lia Urbestra Moŝto, S-ro Dozza, akceptis la kongresanaron en la vastaj ĉambregoj de la urbodomo, ornamitaj per multaj pentraĵoj kaj artlaboraĵoj. Unue venis regalo de trinkaĵoj, kuketoj kaj glaciaĵo. Poste aperis la urbestroj de Bologna kaj Boulogne kaj nia Prezidanto. Oni intersalutis, alparolis la kongresanojn, kaj la du urbestraj moŝtoj interŝanĝis donacojn. Almenaŭ tion oni rakontis al mi poste, ĉar mi mem, post longa atendado en la ĉefsalono (granda, tamen apenaŭ sufiĉe granda por la tuta 1700-opa amaso!) fine forvagis tra la labirinto de preskaŭ egale grandaj ĉambroj por admiri la pentraĵojn, supozinte, ke ial la urbestro ne povis veni . . .

Sekvisla **Kongresa Balo** en la Palaco de Re Enzo, en kiu oni dancis, refreŝigis sin ĉe tabloj kaj paradis per pitoreskaj popolkostumoj. Nu, tie mi estis, kvankam mi limigis mian programon al la dua el la tri eroj, kaj koncerne la du aliajn mi kontentiĝis ĝuante per okuloj kaj oreloj.

Al la riĉa bankedo de Kongresaj plezuroj aliĝis ankoraŭ la **Arta Vespero** merkrede en la Urba Teatro, kaj la **Jubilea Rapsodio** vendrede ĉe la plenaera Fervojista Teatro. Ambaŭ altiris grandan publikon. La Arta Vespero estis muzika programo kun ĥoro kaj kantartistoj vere unuarangaj. Se la tenoro, Pietro Brani, havis la

Aŭdite. Amiko al eldonisto Juan Régulo: “Ĉu vi aŭdis, ke la Aŭstria Esperanto-Federacio ekskomunikis la poemlibron *Kvaropo*?” Juan Régulo: “Nun se mi havus mil ekzemplerojn mi rapide vendus ilin.”

plej altan furoron, tio apartenas parte al la konata idolamo, kiun tradicie ĝuas la tenoroj, ĉar certe la soprano, Andreina Desderi-Rissone, la baritono, Karl August Kohler kaj la aliaj artistoj, havis similan superban kvaliton. Neforgesebla estis ankaŭ la fortepiana kontribuo, mirinde virtuoza kaj elokventa, de S-ro Frank Merrick.

La **Jubilea Rapsodio** provis la verŝajne ne eblan, kaj sukcesis en tre laŭdinda grado, dank' al la dinamika energio, inspiro kaj organiz-talento de Roland Dupuis. Oni nome entreprenis pretigi, dum la kongresa semajno mem, pli ol duhoran programon (laŭ antaŭfarita plano), kiu referus la evoluon de la ideo de komuna lingvo el plej frua tempo ĝis nun, kun ĉefa akcento ĉe la lastaj 50 jaroj. Per klariga eposo (bone deklamita de ges. Starke) kunliganta la scenojn, pianmuzikon, sol- kaj ĥorkantojn, oni prezentis multkoloran filmon pri la progresado de nia ideo. Sur la sceno aperis ankaŭ niaj veteranoj Paul Nylén, Edmond Privat, Manuel Fernández Menéndez, Teo Jung, intervjuate de S-ro Starke kaj S-ro Luigi Minnaja. Ankaŭ D-ro Lapenna aperis en konvena momento por ripeti unu el la apogeaj punktoj el siaj pled-paroladoj en Montevideo, finante per la digna deklaro: "Ni venas ne por ricevi, sed por doni!" Entute pia kaj nobla ideo estis la Jubilea Rapsodio, kaj gratulindaj estas ĉiuj partoprenintoj pro la bona sukceso. La kompatindaj rolantoj eĉ tute ne kongresis pro la antaŭprovoj!

Belarta Konkurso

La soleno pri la ĉijara Belarta Konkurso havis lokon en la bela Muzika Konservatorio, kie la muziko de la orgeno sonore interpunktis la paŝojn de la programo. Prezidis Prof. **Waringhien**, membro de la juĝa komisiono pri la poeziaj branĉoj, kaj ĉeestis ankaŭ S-ro **R. Bernard**, juĝanto pri la proza kaj drama branĉoj, kiu ankaŭ deklamis.

REZULTOJ :

Originala Poezio : 1. F-ino Marjorie Boulton, Anglujo (*Alvoko al amo*). 2. Jiří Kořínek, Ĉeĥoslovakujo (*Komenco kaj fino*). 3/4. Claude Piron, Belgujo (*La soldato, kiu marŝas kaj Havena nokto*).

Traduka Poezio : 1. Jiří Kořínek (Neruda : *Balado pri la polko*). 2. Enrico Dondi, Italujo (Dante : *Manfredi*). 3. Pastro H. A. Rosbach, Norvegujo (Gerhard : *Transdonu de la koro la zorgon*).

Prozo : 1. J. H. Rosbach, Norvegujo (*La junulino, la ĉapelo kaj mi*). 2. Marjorie Boulton (*Justeco*). 3 kaj 4. R. J. French, Anglujo (*La kvara*), kaj J. D. Applebaum, Anglujo (*Ichok, la bovido*).

Dramo : Marjorie Boulton (*Ĉe l' akvo de forgeso*).

Prof. Waringhien anoncis, ke ĉijare konkuris 35 aŭtoroj el 14 landoj per 99 konkursaĵoj. Premiitoj kaj honore menciitoj apartenas al sume 8 landoj. La nuna jaro alportis sonantan triumfon al F-ino **Marjorie Boulton** el Anglujo, kiu kaptis unuan lokon en originala poezio kaj en dramo, kaj duan lokon en la prozo. F-ino Boulton (ali-landanoj eble volus titoli ŝin "D-rino", ĉar ŝi havas eĉ du licenciojn de Oksforda

Momento. S-ro, kun aŭtograf-libro en mano, al Prof. Waringhien : "Pardonu, sinjoro, el kiu lando vi estas?" Prof. W. : "El Francujo." La sinjoro : "Ho pardonu—francon mi jam havas."

Universitato) estas poetino kaj verkistino en angla lingvo, kiu trovis en Esperanto sian plej elokventan instrumenton. Profesie ŝi estas prelegistino kaj vic-estrino de instruistina seminario. Gratulinda estas ankaŭ la duobla sukceso de S-ro **Jiří Kořinek** el Brno: li gajnis la unuan lokon en traduka poezio kaj la duan en la originala poezio. Kaj iom sensacia estas la sukceso de la juna **Enrico Dondi**, kiu, apenaŭ tri jarojn esperantisto, forportis duan premion per traduko el la *Purgatorio de Dante*. S-ro Dondi komencis traduki la *Purgatorion* post kvarmonata lerno, kaj nun ĝin preskaŭ kompletigis.

Publika kunveno de la Akademio

Oni elektis la temon—pri kiu regas iom da disopinio ĉe la akademianoj—la gramatika karaktero de la vortradikoj. Akademiano **Vilho Setälä** donis klaran eksponon pri la tezo de radik-karaktero per konataj ekzemploj: *bro*s kaj *martel* havas substantivan ideon, tial *broso* kaj *martelo* estas nomoj de objektoj; sed *komb* kaj *skrib* estas verbideoj, tial *kombo* kaj *skribo* estas unuavice agoj, kaj por esprimi la instrumenton necesas diri *fosilo*, *skribilo*. Li sin apogis sur la vortteorio de R. de Saussure, pli komplete ellaborita de Kalocsay. S-ro Setälä ankaŭ citis la helpon doneblan de vortstatistiko por determini la gramatikan klason de la radiko: se vorto troviĝas en tekstoj pli ol 5 fojojn el dek kun sama gramatika finaĵo, oni povas atribui la radikon al tiu gramatika klaso.

Akademiano **Paul Nylén** kontraŭis la ideon, ke radiko sen finaĵo apartenus al iu gramatika kategorio, kaj prezidanto **Isbrucker**, citante la *Universalan Vortaron* de Zamenhof, kiu difinas la radikojn, subtenis la tezon de S-ro Setälä. Al la diskuto kontribuis ankaŭ D-ro Privat.

La temo ne multe stimulis la publikon. Partoprenis la ĝeneralan diskuton S-roj Pace, Vančik, Rossetti kaj Wong Kenn.

Solena Fermo

Je la 9-a horo en sabato, la 6-a de Aŭgusto, la kongresanaro kolektiĝis denove en la luksa Urba Teatro por la lasta soleno de la Kongreso.

Post la alparolo de nia Prezidanto, S-ro Malmgren, en kiu li resumis la laborojn, la edifajn plezurojn kaj la agrablojn de la kune pasigita semajno kaj instigis ĉiujn al plua, persista klopodado por nia afero, nia Ĝenerala Sekretario, Prof. Lapenna, konigis la ĉefajn rezultojn el la kongresaj laboroj kaj laŭtleĝis la proponan tekston de kongresa rezolucio, kiun la ĉeestantaro aprobis per unuanima aklamado.

S-ro Hans Jakob faris sian adiaŭan saluton kiel Estrarano kaj Ĉefredaktoro de la organo. Li komunikis, ke lia naskiĝdato estas la sama kiel tiu de Zamenhof: la 15-a de Decembro—kvankam ne en la sama jaro! De 50 jaroj li estas esperantisto praktika, de 30 jaroj esperantisto profesia. Li konatiĝis kun D-ro Zamenhof en la jaro 1913. Finante, S-ro Jakob alvokis al obstina laboro por la celo, eĉ se tio daŭros—ankoraŭ 50 jarojn!

S-ro Kavaliro Zacconi, Prezidanto de LKK, donis sian lastan oficialan saluton al la Kongreso. Li petis indulgon pro la mankoj kaj dankis al la LKK pro la streĉoj kaj sindona plenumado de la devoj.

S-ro Malmgren esprimis specialan dankon al urbestra moŝto Dozza pro la ornamado de la urbo kaj urbaj tramoj, pro la oficiala akcepto kaj la kongresa balo. Ĉio estis plenumita en plej malavara kaj belefakta maniero. Li ankaŭ dankis al ĉiuj, kiuj kontribuis al la sukceso kaj alvokis al tiuj kongresanoj, kiuj ne estas membroj de UEA, aliĝi al nia Asocio.

S-ro Gustav Kühlmann, kiel prezidanto de la LKK por nia 41-a,

varme invitis ĉiujn al la Universala Kongreso en Kopenhago dum 1956.

Prof. Lapenna dankis al S-ro Malmgren pro lia grava rolo kaj la forta laborado, kiun li, ankoraŭ kun postefikoj de grava malsano, plenumis

ĉe la kongreso. Li substreki la alvokon de nia Prezidanto, ke ĉiuj aliĝu al UEA.

La Kongreso finiĝis per la tutkora, komuna kantado de *La Espero*.

Ĝis revido en Kopenhago !

Kongresa Rezolucio

La 40-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Bologna de la 30-a de Julio ĝis la 7-a de Aŭgusto 1955, en ĉeesto de 1,700 reprezentantoj el 36 landoj, unuanime :—

- (1) kun ĝojo konstatas, ke la Ĝeneva Konferenco de la kvar ĉefoj de Registaroj iniciatis malstreĉigon de la internacia tensio kaj esperas ke tiu komenco estos sekvata de pozitivaj rezultoj precipe sur la kampo de pli bona kompreniĝo kaj proksimiĝo inter la larĝaj popoltavoloj de ĉiuj nacioj de la mondo ;
- (2) esprimas sian kontenton pro la Rezolucio de la 10-a de Decembro 1954, per kiu la Ĝenerala Konferenco de UNESCO objektive rekonis, ke la Internacia Lingvo Esperanto kontribuis al internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj al monda paco, kaj ke ĝiaj atingiĝoj respondas al celoj kaj idealoj de UNESCO ;
- (3) atentigas, ke ĉiu sincera klopodo proksimigi la popolojn, krei spiriton de reciproka toleremo kaj formi veran internacian solidarecon ne povas neglekti tian potencon instrumenton de internacia komunikado kia estas la Internacia Lingvo Esperanto kaj tial
 - (a) apelacias al naciaj kompetentaj instancoj doni sian apogon al disvastigo de Esperanto, tute speciale per helpo al starigo aŭ restarigo de la Esperanto-organizaĵoj en tiuj landoj, kie tiaj pro diversaj kaŭzoj nuntempe ne ekzistas ;
 - (b) petas la Registarojn de ĉiuj ŝtatoj profunde studi la eblecojn enkonduki Esperanton en la lernejojn prefere surbaze de Internacia Konvencio, kiu fiksos la detalojn rilate la studon en diversaj landoj samtempe ;
 - (c) notas kun aprobo, ke la urbestroj de Bologna kaj Boulogne-sur-Mer dum la Kongreso solene ĝemeligis siajn urbojn per Esperanto kaj esperas, ke multaj aliaj urboj sekvos tiun ĉi ekzemplon ;
 - (d) turnas sin al ĉiuj, kiuj aspiras pli grandan unuecon de la mondo, kun la alvoko ellerni la Internacian Lingvon kaj vaste praktiki ĝin en la internaciaj rilatoj.

Solena Decido de la du Urbestroj de la urboj Boulogne-sur-Mer kaj Bologna

Ni, urbestroj,

Certaj ke ni respondos al la profundaj aspiroj kaj al la efektivaj bezonoj de la loĝantaroj kun kiuj ni ĉiutage rilatas kaj kies plej vivajn interesojn ni estas komisiitaj prizorgi,

sciante ke la civilizacio havis sian lulilon en niaj malnovaj komunumoj kaj ke la spirito pri libereco jam komence enskribiĝis en la liberkartoj kiujn ili kapablis havigi al si per longa batalo kaj strebado ;

konsiderante ke la irado de la historio devas daŭri en pli larĝa mondo, sed ke tiu mondo estas vere humana nur en tiu mezuro, kiam liberaj vivos la homoj en liberaj civitoj—



Tra la Mondo Esperantista

Ni petas regulajn raportojn aŭ raportetojn el ĉiuj mondpartoj por tiu ĉi rubriko, por ke ĝi prezentu tutampleksan bildon pri agado, eventoj kaj interesaĵoj el la Esperanta mondo.

Argentino

La 1-an de Aŭgusto oni publike inaŭguris la straton Esperanto en la urbo Venado Tuerto.

La solenaĵon ĉeestis la lokaj aŭtoritatuloj, magistratanoj kaj popolaj reprezentantoj de la distrikto, esperantistoj kaj ĝenerala publiko. Oni malkovris bronzajn ŝildojn, kiuj eternigos la okazon kaj la nomon de Esperanto.

Per tre bone aranĝita karavano la tiea klubo ebligis la ĉeeston de multaj personoj en aŭtobusoj kaj aŭtomobiloj, kiuj kondukis ilin de la asocia sidejo al la loko de la soleno.

Britujo

La dua stadio de "Eksperimento Midlothian" (vidu *Esperanto*, Oktobro 1954) kulminis la 20an de Junio en koncerto antaŭ pli ol 300 plenaĝuloj, inter kiuj estis reprezentantoj de la Skota Eduka Departemento. 200 infanoj dekdujaraj, kiuj ĵus finis deksemajnan kurson pri Esperanto, prezentis kantojn kaj teatraĵetojn en la lingvo. Aparte impresa estis programero en kiu la plenaĝuloj estis invititaj skribi ordonojn, kiuj estis tradukitaj esperanten kaj poste

legitaj de du svedaj kaj unu germana vizitantoj al ok infanoj sur la estrado. La infanoj ricevis merititan aplaŭdon, kiam ili senhezite obeis ĉiujn dek ses ordonojn.

Bulgarujo

La movado en Bulgarujo subite revekiĝis dum la lastaj monatoj el sia kelkara profunda dormado kaj restariĝis laŭ la iniciato kaj sur la bazo de Mondpaca Esperantista Movado. Ree okazis kunveno de la Bulgara Esperantista Kooperativo. Sofiaj esperantistoj kunvenas nun regule ĉiusemajne—ĉ. 50 personoj. Ĵurnalo eĉ anoncas senpage la horon kaj la programon de la kunvenoj. Kaj estas tre rimarkinde, ke okaze de la lasta mortodato de L. L. Zamenhof prelegis pri liaj vivo kaj verko . . . docento de dialektika materialismo en Supera Ekonomia Instituto de Karlo Marx en Sofio. Universitata kurso de Esperanto kun 50 partoprenantoj estis malfermita en Marto en la sama urbo. El Pazarĝik oni informas en raporto pri kunveno de la esperantista societo: "Montriĝis nesufokebla volo, labori por Esperanto."

En la nuna tago, ni solene devigas nin:

- tenadi konstantajn interrilatojn inter la urbestroj de niaj du urboj, faciligi en ĉiuj kampoj la interŝanĝojn inter ties loĝantoj pere de Esperanto, por kreskigi per pli bona interkomprenado la vivan senton de la homa frateco;
- unuigi niajn pensojn, por helpi tiom, kiom ni kapablas, al la sukceso de tiu necesa strebo al paco kaj prospero, tio estas, de la mondunuigo.

Ĉeĥoslovakujo

Unua tutŝtata konferenco de esperantistoj-pacdefendantoj en Ĉeĥoslovakujo okazis 7-10 de Julio en impona kongresa domo en Otrokovice kun preskaŭ 300 partoprenantoj el ĈSR kaj kun naŭ esperantistaj gastoj el Svedlando, Danujo, Francujo, Aŭstrio kaj Usono. Estis akceptita porpaca rezolucio. Membro de la Sovetunia Akademio de Sciencoj en Moskvo, lingvisto E. Bokarev, informis en sia skriba salutmesaĝo, ke la Akademio decidis sendi lin kiel sian oficialan delegiton al la Konferenco, sed ke li ne povis ĝustatempe veni kaj li venos ĉe la unua okazo al Praha en la afero de Esperanto; diversaj sovetiaj instancoj montris grandan intereson pri Esperanto kaj baldaŭ estos fondita Sovetunia Esperanto-Societo.

El la fakkunsidoj estas menciinda jar-kunveno de la Esperantista Junularo. En la arto-vespero la artisma kolekto de la Esperantista Klubo en Praha "Verda Ĉaro de Julio Baghy" prezentis kun rimarkinda sukceso i.a. konkursaĵojn de ĉeĥoslovakaj esperantistoj premiitajn de la 39-a Universala Kongreso en Haarlem.

Okazis ankaŭ, por interesitoj, katolika Esperanta meso, celebrata de Pastro Macek, kun pactema prediko kaj Esperanta kantado.

33a Germana Esperanto-kongreso

Dum Pentekosto la fama vinurbo Neustadt/Weinstrasse gastigis la 33an Germanan Esperanto-Kongreson, kiu pro la partopreno de pli ol 300 geesperantistoj el 9 landoj fariĝis vere internacia renkontiĝo. S-ro Peter Altmeier, la ministro-prezidanto de la federacia lando "Rheinland-Pfalz", transprenis la honoran protektorecon.

La unua aranĝo en la bela ornamita kongresurbo estis vendrede publika, komune kun la loka grupo de la Eŭropa Unio organizita diskutvespero pri la lingva problemo en Eŭropo kun

prezentado de la Esperanto-filmo "Danlando".

Dum la kongresa soleno dimanĉon antaŭtagmeze en la impona kongresejo "Saalbau" S-ro Hartmann, la ĉefurbestro de Neustadt, bonvenigis la kongresanojn en Esperanto. La praktikan solvon de la internacia lingvo-problemo demonstris esperantlingvaj salutparoloj de gesamideanoj el Aŭstralio, Francujo, Indonezio, Jugoslavio, Nederlando, Sarlando kaj Svedujo. Sekvis kiel kulminpunkto la brila festparolado pri "Unesko kaj Esperanto" de Prof. D-ro Privat, al kiu la ĉeestantoj dankis per kelkminuta tondra aplaŭdo. La komuna kantado de la Himno finis la solenon, kiun partoprenis multaj neesperantistoj.

Per 1,557 voĉoj por, 119 kontraŭ kaj 26 sindetenoj la asocia kunveno decidis la kolektivon aliĝon de GEA al UEA kaj elektis jenajn reprezentantojn en la Komitato de UEA: S-roj Konrad Deubler, Felix Epstein, Richard Reuchlin kaj D-rino Christa Spruch.

Kiel prezidanton de GEA oni reelektis D-ron Wilhelm Herrmann, kiu jam ekde la U.K. en Haarlem apartenas al la Komitato de UEA. En rezolucioj al la Eŭropa Konsilantaro, al la germanaj federacia kaj landaj registaroj la kongreso atentigis pri la rekono de Esperanto fare de UNESKO kaj petis pri subteno al la klopodoj enkonduki Esperanton en la lernejojn.

London la kongresanoj ekskursis per speciala vagonaro al la najbara Deidesheim, kie ilin bonvenigis la urbestro kaj la loka folkloro grupo. Post rondiro tra la ĉarma vinurbeto la internacia rondo travivis gajan posttagmezon en la salonego de la loka vinkorporacio.

Mardon vespere la landa radiostacio "Südwestfunk" dissendis duon-horan raporton pri la kongreso kun kelkaj intervjuoj kaj partoj el la kongresa soleno kaj la katolika diservo, kiu same kiel la evangelia okazis en Esperanto.

Hungarujo

Kunvenas rondo. La 4-an de Aŭgusto estis la unua kunveno de la

Esperanto Rondo *Paco* de la V-a distrikta Kulturhejmo en Budapeŝt. Regulaj kunvenoj okazas ĉiuŝaŭde je 17a-21a h. Post kelkara silento denove ekfunkciis Esperanto en Hungarlando. El la redakto de la vespera partia ĵurnalo *Esti Budapeŝt*, organo de la urba konsilantaro, venis letero, en kiu staras "Pri la hungarlanda estonto de la E-movado devas labori mem la esperantistoj, serĉi la malnovajn kaj komenci eduki novajn. Se denove estos Esperanta vivo—kontraŭ kio ne ekzistas ia principa malhelpo—ankaŭ la radio ne hezitos doni helpon." Oni promesis publikigi pli gravajn sciigojn de la movado. La subskribinto, K-dino Erzsébet Kis, iama esperantistino, skribis la lastan frazon en Esperanto: "Mi deziras, ke la malnovaj samideanoj nove organizos la movadon de la esperantistoj." La hungaroj do devas ekagi! Sed oni tre bezonas la bonvolan simpatian kaj helpon de tutmondaj esperantistoj. Kiu povas, sendu gratulkarton, instigon kaj precipe legaĵojn: kajerojn, iajn ajn E-revuojn, prospektojn, afiŝojn por pruvi en la kulturhejmo—kie ankaŭ prezentaĵoj estas eblaj—ke la nova rondo havas valorajn rilatojn kun la tutmondo por internacia kulturkaj pac-laboro. Oni deziras ankaŭ prezenti lumbildseriojn, uzi nelongajn prelegtekstojn. Adreso: "Paco" Esperanto-Rondo (Béke Eszperantó Kör), V., ker. Kulturrotthon, V., Engels-tér, Budapeŝt.

Okaze de la dekjara festkunveno en la Banko de la Hungara Soveta Societo kelkaj membroj ricevis por bona laboro memor-diplomojn. Inter la unuaj oni menciis "la reprezentanton de Mondpaca Esperanto-Movado: S-ron Pál Balkányi kiu "en la tuta mondo sukcese helpas konigi la sovetan kulturon".

Esperanto en la hungara radio. Dimanĉe, la 17-an de Julio, dum radio-rubriko nomita

Radio-leksikono, oni diris respondotan temon: Kio estas la lingvo Esperanto kaj kiu estas ĝia aŭtoro? Por la plej bonaj respondoj oni deklaris konkurson. La kvinminutan tre objektivan klarigon donis iu profesoro de budapeŝta lingvista instituto menciante ankaŭ, ke D-ro Zamenhof mem komencis krei la Esperantan literaturon tradukante klasikaĵojn kaj ke tiun altan laboron daŭrigis D-ro Kalocsay. Oni disaŭdigis, ke inter ĉiuj demandoj de Radio Leksikono la plej granda interesiĝo montriĝis pri tiu ĉi temo, kaj ke inter la respondantoj la unuan libropremion ricevis S-ro Paŭlo Balkányi, Budapeŝt. Tre utile estus, se multaj diverslandaj radioaŭskultantoj, menciante la suprajn dissendojn, memorigus la hungaran radion, kiel efike ĝi uzis Esperanton preskaŭ ĉiutage antaŭ kelkaj jaroj en kadro de siaj sciigoj kaj petus ties revivigon kun artaj, literaturaj komplementoj. Adreso: Radio, Budapeŝt.

Japanujo

"Infanoj de la Mondo." Post grandega klopodo, la dua volumo de la serio pri Britujo kaj Irlando eldoniĝis. Ĉarman aspekton ĝi havas, kaj sendube faros kontribuadon al pli bona interkompreniĝo inter la japanaj kaj britaj infanoj. Oni ricevis ĉirkaŭ 2,500 verketojn kaj multe da gravuraĵoj, desegnaĵoj kaj fotoj pro la helpemo de samideanoj.

La unua volumo pri Francujo jam aperis; la tria volumo, tiu pri Ĉinujo kaj Koreujo eldoniĝos en Aŭgusto.

Oni nun urĝe bezonas materialon por la mezeŭropa volumo—Belgujo, Germanujo, Nederlando kaj Svislando. Sendu tuj al Heibonsya, Ltd. No. 4, Yonbancho, Chiyodaku, Tokyo, Japanujo.

Sovetio

Pri la aktiviĝo de rusa akademiano E. Bokarev jam informas nia raporto el Ĉeĥoslovakujo. Per aparta letero el Sovetio ni ricevis raporton pri vizito al Ak. Bokarev. Li invitis nian korespondanton al si en Moskvo, kaj ili diskutis kelkajn horojn pri la atingoj en Montevideo, pri la Esper-

anta movado en la tuta mondo kaj pri ebleco de renaskiĝo de Esperanto-movado en USSR. La 19-jara filino de Bokarev, Ludmila Bokareva, portas kiel esperantistino la verdan stelon kaj klopodas fondi Sovetunian sektion de la Mondpaca Esperantista Movado (MEM). Bokarev mem posedas bonegan bibliotekon kun gramatikoj de preskaŭ 100 artlingvaj projektoj kaj granda kolekto ankaŭ de Esperantaj libroj. Li montris al sia gasto propramanajn leterojn de Zamenhof. Li estas supera scienca laboranto de la Lingvistika Instituto de la Sovetunia Akademio de Sciencoj. En Aprilo li petis el Bulgarujo katalogon de la Esperanta literaturo kaj informojn pri la E-movado por utiligi ilin en sia laboro.

Svedujo

La Sveda sekcio de KELI festis 20-jaran jubileon dum Pentekosto en Stokholmo kun rekorda publikeco per sinsekvaj numeroj en Kristanaj gazetoj. En la solena Diservo predikis Erik Carlén, prezidanto de KELI. La sekcio nun havas 432 membrojn kaj 8 grupojn, ĝi ĵus eldonis tre belan matrikulon kaj interesplenan jubilean numeron de sia organo kaj preparas novan someran kurson kaj la akcepton de la KELI-kongreso en 1956.

Urugvajo

En la oficiala liceo por knabinoj

“Instituto José Batlle y Ordóñez” (adr.: Av. Agraciada 2025, Montevideo, Urugvajo), la Urugvaja Esperanto-Societo aranĝis Esperanto-kurson kun partopreno de 42 geprofesoroj kaj liceanoj. Instruisto S-ro José Martí gvidas la kurson, kiu estas sub aŭspicio de la direktorino de la instituto F-ino Prof. Alicia Goyena, de la katedro pri literaturo. La gekursanaro entuziasme lernadas en kurso kiu daŭros tri monatojn. Ni sugestas ke la esperantistaro danke gratulu al Prof. Alicia Goyena, kiu favoras ne nur je Esperanto en tiu ĉi okazo, sed ankaŭ je la 1-a *Universala Ekspozicio de Esperanto*, kies sidejo estis en la instituto mem. La kurso formale komenciĝis la 19.VII.

Usono

La tria Kongreso de la Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko (8-10 Julio) bone sukcesis. Aliĝis 88 personoj. La helpurbestro de San Diego (Kal.), S-ro Phil Acker, prezentis al kongresprezidanto F. R. Carlson oran ŝlosilon de la urbo. La kongreslaboroj okazis per tri komitatoj. Okazis festbankedo, koncerto kaj ekskursoj per aŭtobuso kaj ŝipo. Unu el la plej agrablaj momentoj estis kiam la fame konataj J. R. Scherer el Hollywood kaj S-ro Charles Chomette el Los Angeles, kun 19 pliaj personoj, aliĝis al ELNA.



Plene rimita laŭ la originalo

IBSEN: PEER GYNT

El la norvega tradukis E. A. Haugen

Prezo : bind. 15 ŝil., broŝ. 12ŝ. 6p., afranko 9p.

Eldonis : ELDONA RONDO,
Boks 178, Trondheim, Norvegujo

Mendu ĉe via librovendisto aŭ ĉe
U.E.A., Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

Kalocsay respondas

Ni petis amikon Paul Balkányi el Budapeŝt klopodi pri intervjuo kun la princo de nia poezio, Kolomano Kalocsay. Tion li volonte entreprenis kaj baldaŭ raportis, ke D-ro Kalocsay konsentas je la intervjuo. Ĵus atingis nin la teksto de la faritaj demandoj kaj respondoj, kiun kun granda plaĉo ni prezentas al nia legantaro.

Ĉu vi havas pensojn pri la nuna stato de nia literaturo?

Nu, koncerne la nunan staton de la Esperanta poezio, ĝojinde estas, inter la mondo-cirkonstancoj, ke ĝi vivas, kaj kiom pli, ke ĝi floras! Jes, ĝi floras pli riĉe ol iam. Auld, Dinwoodie, Francis, Rossetti, Urbanová Marjorie Boulton, Haugen, Pumpř, Piĉ, Thorsen, kaj kiujn mi forgesas—vere "*the poetry of earth is never dead*": neniam mortas la poezio de Esperanto. Alloge estus paroli aparte pri ĉiu, sed nun kontentiĝu per la supra aklamado.

Dankon. Kiuj poeziaj formoj, laŭ via opinio, estas plej propraj al Esperanto?

Mi kredas, ke la kvinjambo kaj la kromsilaba aleksandro. Sed la lingvo taŭgas por uzo de tre diversaj skemoj. Estas interese, ke la amfibraka skemo, kiun oni uzis iam tiel ofte (vidu "*La Vojo*" kaj "*Preĝo . . .*" de Zamenhof) iom post iom elmodiĝis. Nenio, cetere, pledas por tio, ke ĝin oni revivigu: per sia boatbalanca ŝanceliĝado ĝi efikas preskaŭ kapturte, precipe en longaj poemoj.

Ne estas solvita ĝis nun la traduko de la antikvaj grekaj-latinaj poemoj, ĉar tiu ritmosistemo, kiun mi siatempe proponis, ne enhejmiĝis, kaj tio ja havas siajn kaŭzojn. Unue, ĝi estas tre malfacila pro la viraj cezuroj (mi ne kredas, ke iu kuraĝus traduki per vircezuraj heksamentroj ekzemple la Iliadon). Due, ĝi ne havas la artefekon de la grekaj-latinaj versoj. En ĉi tiuj, nome, la artefeko baziĝas sur tio, ke la ritmon faras ne la akcento, sed la longo de la silaboj, inter la ritmado kaj la akcentado do sentiĝas bela interludo: en la akcentata teksto la ritmo pulsas kvazaŭ ŝtele. Tion povas reprodukti nur tre malmultaj lingvoj (ekzemple la hungara), en kiuj la akcentaj vokaloj ofte estas mallongaj. En Esperanto oni povas tion imiti nur escept-okaze, ekz-e per la verso:

Kaj tio estu rimed' por mia kaj via sav'.

Ĉi tie la i-vokalojn en "tio", "mia" kaj "via" oni elparolas akcente kaj mallonge, dum la longaj silaboj "kaj", "por", "kaj" restas "en ombro". Tiamaniere kaŝludas inter si skando kaj akcentado. Sed en Esperanto (kaj ankaŭ en la germana heksametro) regule identas la skando kaj la akcentado, kaj tio igas la ritmadon malagrabla akra.

Tial mi opinias, ke la antikvajn poemojn oni devus en Esperanto traduki per Esperantaj skemoj kaj kun rimoj.

Sed kio pri la heksametro? Mi opinias, ke ĝin oni plej oportune povas transmeti per oktrokeo; ekz-e jen la Ovidaj versoj:

*Dum la viv' al vi feliĉos, vi amikojn multajn nombros,
Sed se l' tempojn superombros nuboj—sola vi fariĝos.*

Aŭ, agordante la liron de Homero :

*Muzo, kantu la sagacan viron, kiu longan vojon
Inter penoj ĵetiĝadis, detruinte sanktan Trojon.
Multajn urbojn li ekkonis, multajn pensomanierojn,
Ankaŭ sur la mar' elportis multe-multajn korsuferojn,
Ŝildis al si la animon, gardis la kunulojn ŝirme,
Sed ne povis ilin savi, kiel ajn li volis firme,
Proprakulpe ja pereis tiam la kunul-taĉmento :
Ili brutojn de Helio manĝis manke de prudento,
Kaj ĉi tiu do de ili prenis for la reven-tagon.
Ho, diino, Zeŭs-filino, kantu ĉi longegan vagon !*

Kiu daŭrigos ?

Ni vidu ! Permesu alian demandon. Depost la apero de nia lingvo, vi mem laboris sendube la plej amplekse kaj profunde sur la poezia kampo. Ĉu vi opinias, ke la rimoebloj de Esperanto elĉerpiĝas ?

Neniel mi kredas tion. La parenc-rimoj tre vastigis la rimostokon, kaj ĝoje mi vidas, ke la novaj poetoj pli kaj pli uzas ilin. Cetere en neniuj lingvoj oni uzas ĉiam novajn rimojn, certaj rimparoj ofte ripetiĝas. Mi opinias, ke pro timo de adasismo oni ne sufiĉe uzas la apogitajn aŭ super-rimitajn sufiksrimojn : *mordante-ardante, ĉarmanta-dormanta, korbeto-arbeto, vestaĵo-multekostaĵo, venkita-dankita* ktp. Kaj per forta superrimado oni eble povus uzi spice eĉ rimojn kun finkonsonantoj ne-parencaj : ekz-e *kaŝtano-paŝtado, renkontita-hontiga, senĝena-anĝela, oktobro-noktombro, spronpike-rompita, jam brune-ambrule, gardemo-kardelo, vestinte-estinge, starado-skarabo, anĝelkora-danĝervoja, vesperto-respekto, homarano-kamarado*. Tiamaniere oni havus rimojn riĉajn, eĉ tro riĉajn, sed ĝuste la malsameco de la lastaj konsonantoj forprenus de ili tiun iom burleskan efekton, kiun la troriĉa rimo havas. Tia, cetere, estas la rimado de Majakovskij.

Nu, ni lasu al la poetoj digesti viajn konsilojn ! Por nun iom ŝanĝi la temon : kian impreson faris al vi nia venko en Montevideo ?

Plej impresis min la grandioza fortostreĉo de Lapenna ; pri tio oni povas paroli nur en versoj :

*Lapenna venkis ĉe UNESKO
Per strategi' kaj streĉo nerva :
El la lastvica seĝ' observa
Grandiĝis kun mirakla kresko*

*Ĝis alto de l' plafona fresko.
Jes, la nerezisteble verva
Lapenna venkis ĉe UNESKO
Per strategi' kaj streĉo nerva.*

*Kia ŝakmajstra fosforesko
De cerbo ĉiam brile serva !
Indigna, sed trankvilkonserva
Pri l' aĉa Blinkenberg-burlesko,*

Lapenna venkis ĉe UNESKO.

Jen brava komplimento al granda atingo ! Volu diri : el kiu lingvo, post la hungara, vi tradukas plej volonte ?

Anstataŭ respondi, mi transdonos al vi tradukojn el la sep lingvoj preferataj.* Tie mankos la angla : tiun malfacilan terenon mi jam trankvile povas translasi al la skota skolo.

Bonvolu iom paroli do pri viaj neeldonitaj verkoj.

Miaj neeldonitaj verkoj estas : *Tra la Stormo* (tiujn originalajn poemojn mi nun jam ne intencas publikigi), proksimume 120 poemoj de Petöfi, proksimume 120 poemoj tradukitaj el diversaj lingvoj. La Baudelaire-traduko estas almenaŭ tiom de Waringhien, kiom de mi. Mi tradukis krome 77 fablojn el Ezopo ; mi kredus, ke aperinte en libro ili farus kelkan ĝojon al niaj infanoj grandaj kaj malgrandaj ; vere, estas apenaŭ kompreneble, ke Ezopo ĝis nun mankis en Esp-o. Poste mi faris . . . , Sed tion rakonti oni povas nur "*komence de ovo de Leda*". La ĉefkulpulo en tio estis amiko Waringhien kun sia Omar-Kajjam-traduko, per kiu li delogis amikon L. Tárkony priskribi en tiaj robajoj la tutan naturon, historion, literatur-historion, universon kaj sin mem. Vidante la kreskon de tiu verko, delogiĝis ankaŭ mi, kaj priskribis en robajoj la Jaron sub la titolo "Kalendaro". Jen ĉio, trankviliĝu, vere nenio kroma ekzistas ĉi-momente.


Mi esperas, ke tiuj poemoj baldaŭ trovos eldoniston ! Se temus reeldoni el viaj antaŭaj verkoj, kiujn verkojn vi elektus por tio ?

Mi elektus la *Eternan Bukedon*, kompletigitan per la novaj tradukoj. Sed multe pli impone estus kunmeti *Internacian Antologion* el la poem-tradukoj, kiuj iam aperis en *Literatura Mondo*. Kune kun mia materialo, tio estus grandega libro, kaj vere demonstracia verko. Nu, iluzio !

* * *

Mi scias, ke miaj respondoj ne kontentigas vin ; vi certe deziris ion pli interesan, pli personan . . . Sed mi estas laca, urĝas min aliaj laboroj, kaj—pro mia aĝo—mi jam ne estas sufiĉe elasta, por subite re-enhejmiĝi en la atmosfero, el kiu mi antaŭ pluraj jaroj forŝiriĝis. Tamen kredu, ke mi ĉiam kun granda amo rigardas viajn fortostreĉojn, kaj jubile vidas vin, novajn Parnas-ascendantajn, grimpi pli kaj pli supren. Tio, ke vi faris el mi ian idolon, aŭ almenaŭ Vejnemöjnen-Paĉjon, komence ĝenis min, sed poste mi alkutimiĝis, kaj eĉ iom orgojliĝis. En tia orgojlo mi finas per la traduko de du versoj el la poemo de Petöfi, sendita de li al J. Arany :

*Kion mi komencis, kaj ne sen honoro,
Vi, amiko(j), faru plu en plena gloro !*



Vejnemöjnen : legenda patro de la finna liriko (laŭ la *Kalevala*).
Orgojlo : malhumilo, trofiero.

*Ni ricevis poemtradukojn el la lingvoj franca, germana, hungara, itala, rusa, antikva greka kaj latina.

El la tradukoj de K. Kalocsay

Bakĥilides :

Packanto

La Paco semas ĉion bonan, belan
 ĉi-tere : oron, mielan
 kantfloron sur la lipoj ;
 de l'fajro blondan flagron sur la ŝtipoj,
 ke brulu ofere la femur'
 de bov' kaj lana ŝafido sur
 belegaj ŝtonoj altaraĵ ;
 kaj tempon al knaboj karaĵ
 muzikon lerni, dancpaŝojn.
 Sur bronztenilo dura
 de ŝildo terura
 la araneo teksas retomaŝojn ;
 la fero masakra :
 lancpinto, glavo duakra
 de rust' konsumata ruĝas ;
 la kuprogorga
 trumpeto plu ne muĝas ;
 la korosorĉa
 Songo, mielo de l' anim', ne fuĝas
 for de niaj pupiloj.
 Festenoj ĉie, jubiloj !
 Kaj flirtas dolĉe la kantoj
 de geamantoj.

Gerard de Nerval :

Kiuj nin amis . . .

Kiuj nin amis, kie
 Jam estas ? Sub la ter'.
 Ili feliĉas plie
 Jam en pli bela sfer'.

Inter anĝelaj svarmoj
 En ĉielblu' radia
 Kantadas laŭdajn psalmojn
 Al la Patrino Dia.

Ho, pala fianĉino,
 Virgin' en freŝa flor',
 Ĵetita amantino
 Velkinta de dolor' !

L'Etern' el vi mistere
 Ridetis tra l' pupiloj.
 Ho, torĉoj, cindraĵ tere,
 Ciele verŝu brilojn !

Attila József :

Lulkanto

L'okulon fermas la lazuro,
 Dormas la kamp' sub dika drap',
 L'okulojn multajn fermas muro,
 Ekdormu bele, eta knab'.

La kapon klinis al la kruroj
 Kaj dormas vespo kaj skarab',
 Kun ili dormas zum', susuroj,
 Ekdormu bele, eta knab'.

La tramo dormas jam kviete,
 Dum dormo nur per sonĝa frap'
 Sonoriletas iomete,
 Ekdormu bele, eta knab'.

La jako dormas seĝo-brake,
 Ŝiraĵo dormas sur la ĉap',
 Jam ne ŝiriĝos plu ĉi-tage,
 Ekdormu bele, eta knab'.

Ekskurso, bosko, fajfilsono,
 Kaj pilko kaj balanca trab',
 Jam ĉio dormas, eĉ bombono,
 Ekdormu bele, eta knab'.


La malproksimon, kiel globon
 El vitro, kaptos vi por gap',
 Vi de giganto havos povon,
 Ekdormu bele, eta knab'.

Paŝtisto super greg' leona,
 Fajrestingist' kun kaska kap'
 Vi estos. Vidu, panjo bona
 Jam dormas. Dormu, eta knab'.

Jean Ribillard :

Vagado sub palmoj (2)

En sia enkonduko (vidu la antaŭan numeron) la aŭtoro proponas konduki la leganton, kiu bezonas nur sidi komforte kun taso da teo kaj pipo, tra Okcidenta Saharo. "Sidiĝu, mi petas. La gvidonto tuj levos la kurtenon . . ."



LA dekoracio prezentas Saharon.

“ . . . tiu silenta lando tegita de nedifinita tono, kiu ŝajnas la koloro de la Nenio, el kie neniu venas, kien neniu iras, kaj kiu finiĝas per streko tiel rekta kaj neta sur la ĉielo . . . ”*

Sed reale tiu dezerta senlimaĵo montras plurajn vizaĝojn, la unuaj preskaŭ tiel abomenaj kiel la aliaj. Deirinte de la riĉaj kamparoj de la mediteranea “Tell”,† kie kreskas la eŭropa vegetaĵaro, kaj “malsuprenirante” al la sudo, vi eniras la regionon de la “Daŭas”.‡ Ĝi estas montplataĵo el seka tero punktita de maldensaj arbaretoj kaŝitaj funde en kavaĵoj ofte nevideblaj, kie amasiĝas malmultaj pluvakvoj. Tie vi trovas la terebintarbon, la pistakarbon, la zizifarbon. Pri ĉi tiuj du mi volas al vi rakonti la jenan drameton :

Elteriĝante, la juna pistakarbono estus formanĝita de la animaloj se la dorna zizifarbo, vera kusonego el akraj pingloj, kiu senkuraĝigas la plej avidajn manĝemulojn, ĝin ne ŝirmus kontraŭ la dento de la bestoj. Tiel

* *El Fromentin.*

† *Tell : monta regiono en Nordafriko, bordere de la maro.*

‡ *Daŭa : marĉo nomata “chott” en Tunizio.*

defendate la mola burĝono kreskadas, fortikiĝas, iĝas arbo bela kaj firma. Tiam la maldankema pistakarbo sufokas sian bonfaranton. Jen tial la pistakarbo ĉiam deponas siajn semgrajnojn apud zizifarbon.

Pli sude la tero iĝas pli senfrukta. Nek arboj, nek marĉetoj. Intensiĝas la premado de la dezerto. Surtere oni vidas nur mizerajn sporadajn likenojn. La ŝtonaro montretiĝas sur vastaj spacoj, polurita de la sabloplenaj ventoj, kaj ofte tiel nigra kiel karbo. Estas la "Hammada", ebena regiono preskaŭ tute nuda, glata kaj glazurita kiel kamenbreto.

Tre malsama estas la sabludezerto de la Grandaj Erg.* Nenio en Saharo estas pli bela kaj grandioza ol Erg. Matene netaj kaj bluaj estas la ombroj, sed grade laŭ la supreniro de la suno, ili malaperas kaj la konturoj de la dunoj stompigas. La ondoliniaj pintmontoj kaose svarmas kun rebriloj flavaj, rozaj, ruĝaj. Poste la krestoj glimlumas kun rava ortonon kaj eligas kvazaŭ blondan fumon. Estas la vento, kiu senĉesa laboranto skrapetas la plejaltaĵojn kaj forbalaas la subtilan sablopolvon. Vespere, kiam subiras la suno, venas la "malva horo", la mire bela horo. Antaŭ ol ili estos sorbitaj de la nokto la silentaj kaj senvivaj dunoj sin ornamas per tiel milda nuanco, ke ili mienas ne plu timigaj. Ili ŝajnis sin interfrapi kiel furiozaj ondegoj, nun ili kvietiĝas, lutiĝas al senforma kaj rigida maso, kiu transruĝiĝas, nigriĝas kaj foriĝas . . .

La "Tanezrouft"† aspektas kiel tute senreliefa ebenaĵo kun firma tero surŝutita de rondaj ŝtonetoj kaj gruzo. Ĝis nevidebleco vastiĝas la "Reg",‡ sen akvo, sen vivo, kie despote regas la vento. Ĝi estas absoluta dezertiĝo en morta silento, la lando de la terursonĝo kaj de la timo, kiun la nomadoj trapasas kun febra rapideco.

En Saharo la bestoj estas tiel maloftaj, kaj en same necerta situacio, kiel la vegetaĵoj, per kiuj preskaŭ ĉiuj sin nutras. En la dromedaro tiu mizera bestaro posedas sian plej dignan reprezentanton. Mi longe parolos pri amiko Dromedaro, la "ŝipo de la dezerto", tiu stranga kvarpiedulo, kies harmonia bleko similas al trombonsono, kiam familiaj ĉagrenoj turmentas la virtuozon.

Estas ĝia apero je la sesa jarcento p.K. kiu ebligis al la "Zenetoj", la famaj berberaj invadintoj, detrui la lastajn rifuĝejojn de la bizanca civilizacio; kaj pli proksime al ni, la ĉefa okazo, kiu klarigas la konkeradon de Saharo estas ne la ekokupo de In-Salah aŭ la venko en Tit, sed ĝia definitiva eniro en la servon de la franca ŝtato.

Same pri ĝi disvastiĝas legendoj, kiel pri la marserpento. Tiel oni diris, ke la movo de la "mehari"§ okazigas naŭzojn. Kolonelo Karbuĉia, komisiite proksimume en 1843 por organizi la unuan militistaron de meharistoj, deklaris, ke li elektis inter siaj soldatoj tiujn, kiuj plej bone toleris la marvojaĝon de Francujo al Alĝerio. Iomete pli da zorgo kaj li rekrutigus ilin inter la maristoj.

* *Erg* : vasta regiono el sablodunoj.

† *Tanezrouft* : "la lando de la soifo," perfekta dezerto.

‡ *Reg* : ebena kaj ŝtonplena spacego.

§ *Mehari* : rajdodromedaro.

Ĉiu scias, ke la afrika kamelo kun unu ĝibo devas esti nomata dromedaro, kiun jene difinas la *Plena Vortaro* : “Speco de kamelo kun unika ĝibo surdorse, kaj kiu tre rapide kuras.” Sed ĉiuj afrikaj kameloj, aŭtentikaj dromedaroj, iras po 3 kilometroj en horo. Ili iras ĝis 4, kiam kondukisto provizita per nerompebla bastono ilin zorge gvidas. Bonega mehari amblas po 6–6½ kilometroj en horo por tagvojo de 60–70 kilometroj. La eta troto donas 9–10 kilometrojn, sed ĝi multe lacigas. Praktike ne ekzistas galopo ; spasmeca kiel ektusego, ĝi estas akirita per batoj kaj krioj. La sola rapida irmaniero estas la granda troto : tiu de la “fantazia”*, de la kuratako kaj de la senesperaj forkuroj. Por toleri tiun fuĝprocedon la meharisto zonpremas siajn internaĵojn de la subventro ĝis la stomako, ĉar li estas forskuata kvazaŭ prunarbo dum rikolto. Cetere facile estas tion eviti ne trotante ; la besto tre volonte konsentas. Pro karaktero kaj higieno ĝi preferas paŝe marŝi. La nura aspekto de la selo, la “rahla”, permesas tion diveni. Ĝi estas simpla sidilo sur kiu oni sidas kiel sur seĝo, kun la nudaj piedoj kuŝantaj sur la kolo de l’animalo. Per multaj pinĉoj de la piedfingroj, kiujn la dromedaro tuj komprenas, oni ĝin direktas kiel ĉevalon per kruropremoj.



Al dromedaro oni faris reputacion de sobreco, kiu estis la komenca kaŭzo de grandnombraj mortigoj. Ĉar la senmalicaj ŝtatoficistoj naive pensis, ke ĝi preskaŭ tute abstinis manĝon kaj trinkon dum marŝado, kaj ili petis de ĝi pli multe ol ĝi povas doni. Envere ĝi glutas la saman volumenon da furaĝo, la saman kvanton da akvo kiel la grandaj herbomanĝantoj. Sed ĝi kapablas toleri egan malregulon pri la horoj, aŭ pli ĝuste pri la tagoj de manĝado.

Ĉevalo kontentiĝas per 25 litroj da akvo ĉiutage. Dromedaro trinkas da ĝi 100 litrojn per unu glutado kaj ilin enrezervigas. Malgrasega ĝi atingas la trinkejon kaj revenas dikventra. Oni komprenas, ke ĝi povas resti dek

* *Fantazia* : speco de rapida kaj akrobata karuselo.

tagojn ne trinkante dum vintro, kaj maksimume tri en somero. Sian provizon de graso ĝi enmagazenas en la ĝibon, kiun oni vidas konsumiĝi dum vojaĝo kaj restariĝi sur paŝtejo.

Ĉiujare dromedaro nepre bezonas sesmonatan libertempon. Tiu necesa ripozo igis malfrua ĝian akcepton en la administracion, kiu estas cedema pri la sumo da utila laboro, sed ne serĉas pri la ĉeestadhoroj. Tiu besto paŝtiĝas dum la trikvaronoj de sia vivo, kaj povas sin paŝti nur sur la senlimaj spacoj de “acheb”.* Ĉar ne pli ol povas vivi hirundo en kaĝo, aŭ “chamba”† en urbo, dromedaro povas vivi en stalo. Ĝi estas malfacile kontentigebla kaj zorge elektas sian furaĝon. “Malsato estas mortiga malsano”, dirus Kolonelo Karbuĉia.

Tiu malsano estas ne la sola. Dromedaro periode suferas skabion, kiun oni flegas per vegetaĵa gudro. Ĝia haŭto estas el stranga substanco, ĉar oni replandumas eluzitan piedon de dromedaro kiel malnovan ŝuaĉon per felpeto kaj aleno. Sed ĝi timas la pikojn de tabanoj, kiujn pikojn oni flegas per ruĝa ferilo. Ne konfidu vunditan dromedaron al zorgemo de eŭropa bestkuracisto. Tio estas mortkondamno !

Ne ĉiam oni konas pri kio ĝi pensas. Ĝi similas al la dezerto, kutime kvieta, sed subite trairata de intensegaj uraganoj. Kiam la virdromedaro, la “faal”, seksardas, ĝi iĝas danĝera, malfacile obeigebla, kaj iafoje eĉ mortigas sian kondukiston. Sed kiam forflugis la pasiiĝa tempo la *faal* refariĝas dolĉa kaj manovrebla. Ĝi konsistigus fuŝkvalitan brutaron, sed nepre bezona ĝi estas kiel la sola besto adaptita al Saharo. “Kreinte la dezerton, la naturo kompensis sian eraron kreante la dromedaron.”

Ĝia rezistokapablo estas konata, sed oni devas ĝin ne trouzi. Tiom pli bedaŭrinde estas, ke la dromedaro havas sian propran manieron por protesti kontraŭ la malprudentaj traktadoj : ĝi mortas. Ĝi mortas kun konsternantaj simpleco kaj facileco. Ĝi ne avertas, ne ĝemante—almenaŭ ne pli ol kutime, ĉar ĝi estas denaske blekaĉema—la dromedaro survoje marŝadas. Kiam ĝi estas elĉerpita, ĝi kaŭriĝas kaj diskrete redonas al Dio sian malpezan animeton, kun multe da digno, mienante kvazaŭ ĝi pensus pri alia afero. Sola la longa kolo strangete tordita kaj ĉe kies ekstremaĵo la kapo estas teren ĵetita, komprenigas pri la angoro de la morto . . .

Ĝi tamen estas la nedisiĝa kunvivanto de la nomado, lia amiko. Kaj kia objekto por amatoroj de fotografaĵoj, kun ĝia sinteno de arogante fieraj grandsinjoro, ĝia masiva ostaro muntita sur maldikaj kaj longaj kruroj, kies elastaj piedoj faras silentan pantoflopaŝadon . . .

Ĉu vi deziras surdromedare promeni kun mi ?

* *Acheb* : nedeterminita vegetaĵo, sed kategorio de kreskaĵoj, kiuj posedas sian specialan taktikon por batali kontraŭ la senpluveco. Ili batalas per sia propra grajno de preskaŭ nedifinita daŭro. Kiam falas grava pluvo la grajno ĝin uzas kun admirinda energio. Dum tre mallonga tag nombro ĝi ĝermas, kreskigas sian stangon, malfaldas sian floron kaj kreas novajn grajnoj. Poste la acheb mortas, sed la juna grajno, pelata de la vento, kovrita de sablo, kojnumita sub roko, atendas dek jarojn se necese la sekvanta pluvon.

† *Chamba* : loĝanto en norda Saharo, fama meharisto.

Alvoko de CED al Geinstruistoj-Esperantistoj

La Rezolucio de UNESKO de la 10-a de Decembro 1954 signifas ne nur oficialan rekonon de la valoro de Esperanto por la scienco, edukado kaj kulturo, sed ĝi ankaŭ prezentas solidan bazon por pliaj klopodoj rilate la instruadon de Esperanto en la lernejoj. La Rezolucio tute speciale antaŭvidas, ke la Ŝtatoj-Membroj regule informados la Ĝeneralan Direktoron pri la rezultoj, kiujn donas la instruado de la Internacia Lingvo en diversaj edukaj institucioj.

UEA jam entreprenis diversajn paŝojn rilate interlernejan korespondadon kaj interŝanĝojn, koordinatajn eksperimentajn aktivecojn en la lernejoj kaj ĝenerale rilate instruadon de Esperanto en la lernejoj. Por la sekventa jaro UEA planas novajn gravajn paŝojn sur tiu kampo. Por ke ĝi povu sukcese plenumi tiun taskon, ĝi bezonas la helpon de ĉiuj geinstruistoj-esperantistoj. Antaŭ ĉio estas necese precize scii la nunan staton koncerne instruadon de Esperanto en la lernejoj (la lasta enketo estis farita por la jaro 1950-51 kaj kompletigita per kelkaj informoj el la jaro 1952-53) kaj havi plej freŝdatajn informojn pri la nombro de geinstruistoj kaj geprofesoroj, kapablaj kaj pretaj instrui Esperanton en la lernejoj. La Centro de Esploro kaj Dokumentado entreprenas do du enketojn: (a) pri la nombro de geinstruistoj-esperantistoj kaj (b) pri la lernejoj en kiuj Esperanto estas instruata.

(A) Geinstruistoj-esperantistoj

CED afable petas ĉiujn aktivajn aŭ emeritajn geinstruistojn kaj geprofesorojn,

kiuj parolas Esperanton kaj kiuj instruas(-is) kiun ajn objekton en kiu ajn lernejo aŭ universitato de la mondo respondi, plej oportune per ordinara poŝtkarto, al jenaj demandoj:—

(1) Lando; (2) urbo; (3) nomo; (4) adreso; (5) ĉu aktiva aŭ emerita; (6) nomo de la lernejo (nacilingve kaj Esperante), en kiu vi instruas aŭ, se emerita, laste instruis; (7) grado de la lernejo sub 6 laŭ la leĝoj de via lando: ĉu elementa, mezgrada (licejo, gimnazio ktp.) aŭ altgrada (universitato aŭ samranga altlernejo); (8) objekto(j), kiu(j)n vi instruas; (9) ĉu vi estus preta, en okazo de bezono, instrui Esperanton en via lernejo aŭ en alia lernejo de via urbo aŭ loko? (1) dato kaj subskribo.

La respondojn al la supraj demandoj bonvolu adresi al la kunlaboranto de CED por lernejaj demandoj S-ro David Kennedy, 21 Westfield Road, Bishop Auckland, Co. Durham, Britujo.

(B) Lernejoj en kiuj Esperanto estas instruata

La dua enketo rilatas al la lernejoj, en kiuj Esperanto jam estas instruata. CED ĝentile petas ĉiujn geinstruistojn kaj geprofesorojn, kiuj instruas Esperanton en kiu ajn lernejo aŭ universitato de la mondo, respondi al jenaj demandoj:

(1) Lando; (2) urbo; (3) nomo de la lernejo (nacilingve kaj Esperante); (4) tipo de la lernejo: (a) elementa (aĝo ĝis proks. 12 jaroj), (b) mezgrada (aĝo proks. 12-18 jaroj), (c) universitato, kolegio aŭ simila altlernejo (aĝo proks. 18-23 jaroj); (5) ĉu por knaboj-studentoj, knabinoj-studentinoj aŭ miksita; (6) nombro de gelernantoj de Esperanto laŭ la seksoj; (7) ĉu Esperanto estas instruata oficiale aŭ neoficiale, devige aŭ nedevige, en la kadro de la lerneja programo aŭ ekster ĝi; (8) kiom da jaroj oni jam instruas Esperanton; (9) ĉu Esperanto estas instruata ankaŭ en la lerneja jaro 1955-1956; (10) nomo kaj adreso de la instruist(in)o aŭ profesor(in)o.

La respondoj al la supraj demandoj nepre estu skribitaj sur aparta folieto de papero aŭ sur aparta poŝtkarto. Ankaŭ tiujn respondojn bonvolu sendi al S-ro David Kennedy, laŭ la supra adreso.

CED tre esperas, ke ĉiuj geinstruistoj kaj geprofesoroj respondos kiel eble plej baldaŭ, sed *plej malfrue ĝis la fino de Novembro, al la enketo*

sub (A). Same tiel ĝi esperas, ke la personoj, kiujn koncernas la enketo *sub (B),* respondos *plej malfrue ĝis la fino de Decembro.* Ambaŭ enketoj estas eksterordinare gravaj por la aktivecoj de UEA sur tiu ĉi kampo en la sekvanta jaro.

*Prof. D-ro Ivo Lapenna,
Honorofica Direktoro de CED*

300 West End Lane, London, N.W.6



Esperantista Vivo

Naskiĝoj

Calado. Al geedzoj J. Calado kaj A. A. Garcia Calado en Rotterdam, naskiĝis filino Isabel je la 3-a de Julio.

Gils. S-ro Svan Gils kaj S-ino A. van Gils-Verkaart ĝoje anoncas naskiĝon de unua infano, filo nomata Arjan, je la 8-a de Aŭgusto. Ymuiden, Nederlando.

Gousseau-Normand. Al geedzoj Gousseau-Normand en Thiers naskiĝis filo Daniel (frato por François) je la 13-a de Junio.

Geedziĝoj

Beörge-Peano. Je la 4-a de Julio en Assisi geedziĝis esperantista paro, itala Prof-ino Rosa Peano kaj dana S-ano Jensen Beörge.

S-ro **Matsumoto-Kiyoshi** kaj S-ino **Kawaguchi-Sachiko** geedziĝis en la 30-a de Aprilo. Ambaŭ estas membroj de Kobe Esperanto-Societo, kaj la geedziĝa ceremonio estis farita tute en Esperanta stilo. S-ro Prof. Nukina, prezidanto de Kobe E-Societo, prezidis la celebron en Esperanto, kaj la novaj edzo kaj edzino parolis nur en Esperanto dum la ceremonio. Ni ricevis pri la soleno kelkajn ĉarmajn fotojn, kiujn ni bedaŭrinde ne sukcesis loki en la nuna numero.

Korekto. En *Ranlando* (juli-aŭg.) p. 217, 5-a par., anstataŭ *hirundoj* legu *hirudoj*.

Salamon-Mirovic. La 22-an de Majo, 1955, geedziĝis en Haifa (Israelo) S-ino Irena Nussbaum-Mirovic kaj S-ro Andrija Salamon, del. de UEA en Tivon.

Niedrum-Moon. Je 23a de Julio, Karl-Heinz Niedrum (del. de Slough) kaj Veronica Moon. S-ro Niedrum devenas el Germanujo. Nova adreso: Windsor House, Poyle Road, Colnbrook, SLOUGH, Bucks, Anglujo.



Nekrologo

Al parencoj kaj amikoj de jenaj forpasintaj samideanoj ni esprimas nian koran kondolencon.

Bařviř. Je la 4-a de Majo 1955, mortis D-ro Josef Bařviř, 76-jara, en Brno, Ĉeĥoslovakio. Li estis esperantisto de la komenco de nia jarcento, tradukisto, kursgvidanto.

Diesel. Je la 20-a de Majo mortis S-ro Ewald Diesel en Wiebelskirchen, Sarlando.

Flugel. Je la 6-a de Aŭgusto, Prof. J. C. Flugel, en aĝo de 71 jaroj. Nekrologa noto pri tiu eminenta samideano aperos en la proksima numero.

Holden. Je la 7-a de Julio, S-ro Joseph Holden, 81-jara, del. de UEA.

Hristov. Je la 13-a de Julio mortis S-ro Marin Hristov en Sofio, Bulgarujo. Li estis agema pioniro en la estraro de BEA.

Hromadová. Je la 28-a de Majo forpasis S-ino Anna Hromadova, edzino de Rudolf Hromada, nia Akademiano, poeto kaj longjara Estrarano de UEA.

Joussot. Je la 1-a de Aprilo mortis en Parizo S-ro Paul Joussot, 59-jaraĝa.

Radio-babiloj (2)

*La Esperantistoj havas la
dissendojn, kiujn ili meritas.*

Esperanto-radio-kursoj kun premioj

Pluraj stacioj dissendas Esperanto-radio-kurson. Laŭ mia scio nur Radio Pariza ligas al tia kurso konkurson !

La gvidanto de tiu kurso, S-ro Pierre Delaire, del. de UEA, Orléans (Loiret), Francujo, havas kontakton kun eksterlandaj gesamideanoj, kiuj deklaras sin pretaj akcepti kiel gegastojn dum unu semajno la plej bonajn gekursanojn de lia Esperanto-kurso. Jam ĉe la varbado li atentigas la varbotojn pri tiu aranĝo, kiu kompreneble allogas plurajn vojaĝemajn Esperanto-lernontojn. En julio aŭ aŭgusto S-ro Delaire vojaĝas kun tuta karavano el premiitaj gekursanoj al Anglujo, Hispanujo aŭ/kaj Nederlando, kie la novbakitaj Esperantistoj ĝuas la praktikecon kaj utilecon de Esperanto en internaciaj amikaj rilatoj kaj turismo. Per aŭtobuso(j) ili ĉiutage ekskursas por rigardi la belaĵojn kaj interesaĵojn de la fremda regiono kaj vespere ili babilas kun la gegastigantoj en Esperanto. La unuan kaj lastan vesperojn okazas respektive interkona kaj adiaŭa festkunvenoj, kie renkontiĝas la gegastigantoj, gegastoj kaj aliaj gesamideanoj el la regiono. Alian jaron la gegastigintoj estas la gegastoj en Francujo. Tia aranĝo estas tre kuraĝiga, instrua kaj plezuriga por la genovuloj en la Esperantomovado kaj tre propagandefika por la eksteruloj en la tuta regiono. Informojn pri la akcepto de tia karavano donas S-ino Van der Meulen,

Popelstr. 13, Krommenie (N.-H.), Nederlando, kiu jam plurfoje sukcese aranĝis tian akcepton.

Aliaj stacioj, kiuj dissendas aŭ intencas dissendi Esperanto-kurson, povus imiti la ekzemplon de S-ro Delaire, kiu estas preta informi pri tia (kon)kurso (adreso : 9 bis rue du Commandant-de-Poli, Orléans (Loiret), Francujo).


Ĝeneralaj novaĵoj en Esperanto

Pluraj stacioj dissendas ĝeneralajn aŭ specialajn novaĵojn en Esperanto. Aŭskultanto el Amsterdamo skribis al mi :

“La enhavo de la Esperanto-dissendoj de la nederlandaj stacioj, laŭ mi, estas ne-valoraj. Tiujn informojn oni povas legi en ĉiu gazeto en la mondo.”

Mi ne samopinias kun la skribinto de ĉi tiuj frazoj. Multaj ne-socialistaj Esperantistoj aŭskultas la socialistajn novaĵojn kiel multaj ne-katolikaj Esperantistoj la katolikajn novaĵojn en Esperanto por aŭdi Esperanton flue kaj belsone parolatan. Komencantaj Esperantistoj aŭskultas por ekzerci la komprenon de Esperanto parolata. Kompreneble la intenco estas atingi per tiaj dissendoj la domojn kaj korojn ne-atingeblajn per skribitaj aŭ presitaj informoj. Sed ĉe la Esperantistoj, kiuj povas legi tiujn novaĵojn ankaŭ en sia gazeto, povas profiti ilin, komparante ilin kun la legitaj. Tial danku ankaŭ staciojn dissendantajn “nur” informojn eble jam legitajn en ĵurnalo.

S. S. de Jong



Radio

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso.

Dimanĉo	23.00–23.30	Bilbao. 265m. P. Radio Bilbao, Hispanujo.
Lundo	12.30–13.00	La Coruña. 250m. P.K. Radio Juventud, Real 71, La Coruña, Hispanujo.
	22.50–23.00	Hilversum. 298m., 188m. P. N.C.R.V. Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando (nur unu fojon ĉiumonate).
Mardo	11.55–12.00	Bern. 48.66m., 31.46m., 16.87m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern.
	14.30–14.45	Montevideo. 280m. P. Radio Ministerio Ganaderia y Agricultura, Montevideo, Urugvajo (nur la unuan mardon de ĉiu monato).
	14.50–15.00	Ljubljana. 327m., 211m. K. Radio Ljubljana, Jugoslavujo.
	17.35–17.40	Bern. 48.66m., 31.46m., 16.87m. P. D-ro Baur.
	19.15–19.30	Carlet. 288m. I. Radio Carlet (Valencia), Hispanujo.
Merkredo	15.30–15.40	Wien. 203m., 48m., 41m., 30m., 25m. P.
	16.00–16.10	Caramulo. 205m. I. Rádio Polo Norte, Caramulo, Portugalujo.
	18.10–18.25	Roma. 49.92m., 31.33m. P. S-ro Minnaja. Radio Roma, Casella postale 320, Roma, Italujo.
	22.05–22.15	Wien. 513m., 48.74m., 25.46m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
	22.15–22.20	Hilversum. 402m. I. V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
Ĵaŭdo	06.45–06.50	Perpignan. 202m. K. Radio Perpignan-Roussillon, Perpignan (Pyr. Or), Francujo.
	08.30–08.45	Paris. 348m., 249m. K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.
	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	17.35–17.40	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	22.30–23.00	Valencia. 200m. I.K. Radio Alerta, Colón 11, Valencia, Hispanujo.
	22.45–23.00	Zagreb. 264m. I. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
Vendredo	18.10–18.25	Roma. Kiel merkrede. P. D-ro Musella.
	19.15–19.30	Carlet. Kiel marde.
	21.30–21.45	Guatemala Cd. 370m., 197m., 47m., 30.50m. I. Radio Esperanto, La Voz de Guatemala, Gvatemalo, Mez-Ameriko.
Sabato	08.30–09.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.7m. K.I. Radio Ministério da Educação, Rio de Janeiro (DF), Brazilo.
	18.45–19.00	Barcelona. 360m. I.K. Radio Unión, Emisora del Frente de Juventudes, Barcelona, Hispanujo.
	22.15–22.20	Hilversum. 298m., 188m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

Radio Roma. 2-IX, La fortepiano kaj ĝia eltrovinto Bartolomeo Cristofori ; 7-IX, Mondo esperantista ; 9-IX, Giovanni Pascoli en la jarcento de lia naskiĝtago (1855–1912) ; 14-IX, Novaĵoj el Italujo ; 16-IX, La Itala Renesanco ; 21-IX, Junular-kunvena ekskurso al Scanno kaj al nacia parko de Abruzzo ; 32-IX, La grandaj italaj pentristoj : “il Beato Angelico” ; 28-IX, Verdesto, gastigema esperantisto (skeĉo) ; 30-IX, Leterkesto kaj bibliografio.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 274

1a 4an de aŭgusto, 1955

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de julio kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de julio 1954 :—

	1954	1955
Asociaj membroj ..	7007	5638
Individuaj membroj :		
MJ	953	888
MA	3839	3842
MS	716	796
Pat.	7	9
DM	272	289
HM	56	57
	5843	5881
	12850	11519

DELEGITOJ

Aŭstrujo

Waidhofen. D : vakas.

Belgujo

Brussel. FD (Flegado) : vakas.

Brazilo

Bananeiras (Paraïra). . D : S-ro A. Alburquerque Maranhão.

Vitória de Santo Antão (Pernambuco). D : S-ro Adão Cavalcanti.

Britujo

Bristol (Gloucestershire). VD : S-ro E. M. Preston, The Rosery, Henbury Road, Westbury on Trym. Tel : 62.7773.

Greenford (Middlesex). FD : vakas.

Peasedown St. John ((Nr. Bath) Somerset). D : S-ro E. Gregory, 35 Hillcrest.

Rochdale (Lancashire). D : vakas.

Slough (Bucks). D kaj FD : vakas.

Ĉeĥoslovakujo

Hradec Králové (Hradecký kraj). D : S-ro M. Lukáš, Bezručova ulice, 853, Hradec Králové—2.

Danlando

Fredericia (Jutlando). FD (Sporto) : S-ro E. Larsen, Bjergetgade 84.

Gentofte (Sjaelland). FD : vakas.

Holte (Sjaelland). D : S-ro S. Dragsted, Vejlemosevej 60. Tel : Holte 1698.

FD (Ekonomio) : La D.

Køge (Sjaelland). VD : S-ro H. Sørensen, Torvel 20. Tel : 1313.

Finnlando

Helsinki-Taivaskallio (Uudenmaan Lääni). VD : S-ro A. F. Horsmala, Kunalliskoti. Tel : 790131/46.

FD (Libera kristanismo) : La D.

Francujo

Gap (Hautes-Alpes). D : S-ro R. Colney, Vilao "Verda Stelo", Super-Gap. Tel : (dum deĵoro) : 9.73.

Hyères (Var). D : S-ro P. Mètivier, Avenue Riondet 6.

Germanujo

Altensteig Württ.-Hornberg (14b) (Schwarzwald Baden-Württemberg). D : S-ro W. Schmalzriedt. Tel : Altensteig 340.

Bielefeld (Westfalen). D : F-ino R. Dammer, Oelmühlenstr. 25.

Fürth (Bayern). D : S-ro J. Bitter, Wilhelmstrasse 51.

Tailfingen (Württemberg). D : S-ro W. von der Ley, Ulrichstr. 18. Tel : 5680.

Warngau (Oberbayern). D : S-ro M. Mayr, (13b) Warngau, Reirham 76.

FD (Stenografio) : La D.

Hispanujo

Madrid. FD (Turismo) : S-ro F. Enfedaque Tremps, San Bernardo, 35, 3º, Derecha. Tel : 21-63-85.

Italujo

Perugia (Perugia). D : vakas.

Reggio Calabria. D : S-ro P. Rizzo, presso Prefettura. Tel : Oficeja, 1647; hejma, 1910.

Jugoslavujo

Šibenik (Dalmacija). FD (Juro) : S-ro V. Ćić, Težačka, 10/II.

Zagreb. FD (arkeologio) : vakas.

Kanado

Port Sydney (Ontario). D : S-ro R. Eichholz, Esperanto-Domo.

FD (Unitarianismo) : La D.

Nederlando

Eindhoven (Noord-Brabant). FD (Tekst-industrio) : S-ro F. Slegers, Rogier van der Weydenstraat 39.

Norvegujo

Sauda (Ryflyke). D : S-ro K. Berge, Fløgstad. Tel : 2223.

VD : S-ro A. Bjerke, Fløgstad.

Norda Rodezio

Kitwe. D: S-ro L. Heilberg, Poste Restante.

Sud-Afriko

Cape Town. Peranto kaj D: vakas.

Svedujo

Hallsberg (Narke). D: vakas.

Karlstad (Värmland). FD (Aŭtomobiloj): S-ro K. Anderson, Norrstrandsgatan 6. Tel: 17916.

FD (Oficistaj aferoj): S-ro B. Larsson, Lambergsgatan 27 A. Tel: 56285.

Sundbyberg. FD (Sporto): vakas.

Svislando

Aarau (Kt. Aargaŭ). D: S-ro H. Hunkeler, Girixweg 31.

FD (Fervojo): La D.

Bern. FD (Virinaj aferoj): S-ino M. Grünig, Sahlistrasse 57.

Neuchâtel. FD (Junularo): S-ro M. Abegg, c/o Melle Reymond, Av. du 1er Mars 22. Tel: (038) 55'33'8.

Reconvilier (Jura bernois). D: S-ro E. Rollier, Fraïches 7.

FD (Popolkanto): La D.

Samedan/Engadin (Graubünden). D: S-ino L. Grütter-Haeberli. Tel: 082.6.52.39.

Usono

Anderson (Indiana). D: S-ro R. Powell, 1504 East 27th St.

FD (Protestanta kristanismo): La D.

Charles River (Massachusetts). D: S-ro D. Preston, 42 Village Lane. Tel: NE 3-4661-W.

FD (Scienco): La De.

Elwood (Indiana). D kaj FD: vakas.

Lakeland (Florida). D: S-ro W. T. Myers, 317 East Park St. Tel: 41-595.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Bøge, S-ro E., Högsby, Svedujo

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1955

741. Strasser, S-ro H. W., Zurich, Germanujo

742. Jones, F-ino P. O., Kansas City, Usono

743. Borges dos Santos, S-ro M., Muritiba, Baía (Brazilo).

744. Tálamo, S-ro A. J., São Paulo, Brazilo

745. Domingues de Assis, S-ro P., Campinas, Brazilo

746. Urvat, S-ro H., Vila Bela, Brazilo

747. Whitworth, S-ro A., Thorold, Kanado

748. Oldenburg, S-ro P. B., Laytonville, Usono

749. Souza, S-ro F. A. Lopes de, Baturité, Brazilo

750. Sobrinho, S-ro A. L., Rio de Janeiro, Brazilo

751. Pereira dos Santos, São Paulo, Brazilo

752. Santiago, S-ro P., Maceió, Brazilo

753. Sampaio, S-ro A., Belo Horizonte, Brazilo

754. Farias, S-ro B. F., Cachoeira, Brazilo

755. Farias, S-ro B. Figueiredo, Cachoeira, Brazilo

756. Assis, S-ro F., Palmeira das Missões, Brazilo

757. Forsberg, S-ro Stig-O., Sarpsborg, Norvegujo

758. Gomes de Pádua, S-ro G. A., Rio de Janeiro, Brazilo

759. Wantuil de Freitas, S-ro A., Rio de Janeiro, Brazilo

760. Krajzl, S-ro J., Sarajevo, Jugoslavujo

DONACOJ al la Ĝenerala Kaso: F. W. Shaw 8ŝ.

DONACOJ al la Fondaĵo Montevideo: E. Hansen 5ŝ., C.D.E.L. £3, W. F. Westmancote 10ŝ., R. Seddon 10ŝ.

Internacia Konkurso 1955**Stato je la 31a de julio**

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Jugoslavujo ..	1750	2519	143.9
2.	Izraelo ..	250	330	132.0
3.	Japanujo ..	900	1135	126.1
4.	Maroko ..	750	905	120.7
5.	Aŭstrujo ..	1200	1445	120.4
6.	Finlando ..	2500	2825	113.0
7.	Germanujo ..	3700	4175	112.8
8.	Aŭstralio ..	1000	1125	112.5
9.	Francujo ..	5100	5712	112.0
10.	Danlando ..	2500	2755	110.2
11.	Nederlando ..	4600	4994	108.6
12.	Svislando ..	1600	1700	106.2
13.	Usono ..	2300	2411	104.8
14.	Urugvajo ..	300	310	103.3
15.	Novzelando ..	800	799	100.0
16.	Hispanujo ..	1600	1595	100.0
17.	Portugalujo ..	500	495	99.0
18.	Belgujo ..	2100	2073	98.7
19.	Kanado ..	350	340	97.1
20.	Svedujo ..	5900	5535	93.8
21.	Sudafriko ..	350	305	87.1
22.	Meksikio ..	250	210	84.0
23.	Britujo ..	9200	7535	81.9
24.	Islando ..	350	280	80.0
25.	Sarlando ..	250	180	72.0
26.	Italujo ..	2900	2035	70.2
27.	Norvegujo ..	2200	1530	69.6
28.	Brazilo ..	6400	4370	65.1
29.	Kubo ..	250	150	60.0

ANONCETOJ

Kosto : *du pencoj por ĉiu vorto, aŭ 1 respondkupono por ĉiu duo da vortoj.*

La oficiala aperdato de la revuo estas la 1-a de ĉiu monato. Anoncetoj devas atingi la Centran Oficejon kvin semajnojn antaŭ la aperdato de la celata numero.

Koraloj kaj kristalo ne estas atentataj :
kaj posedo de saĝo estas pli valora ol perloj.
1 Job 28. 18.

Deziras korespondi kun lernantoj geknabaj kaj iliaj instruistoj en nordeŭropo, orienteŭropo, sudeŭropo, orientgermanujo, Islando, Irlando, Afriko, Aŭstralio, Nov-Zelando, Sudameriko. Senga-Ikuo, kama Kôkô, MINOKAMO, Gifu-ken, Japanujo.

Gelernantoj deziras korespondi, interŝanĝi : Takatori-Mezlernejo, Suma-ku, KOBE, Japanujo.

27-jara junulo korespondus kun gesamideanoj tutmonde, pri ĉiuj temoj. Pierre Martinez, 3 rue de Bretagne, RABAT, Maroko.

Du italaj fraŭlinoj deziras interŝanĝi ilustritajn p.k. kun la tuta mondo. Giancarla Gariglio kaj Teresa Catasso, TORREPELLICE (Torino), Italujo.

Korea studento de veterinara medicino deziras korespondi tutmonde pri ĉio interesa precipe kun samideanoj en Danlando kaj Germanujo. Respondo certa. S-ro S. K. Paik, N-ro 115, Bukchang-Dong, Ri-Ri, Cheonla bukdo, Koreo.

Dudekjarulo korespondos kun gejunuloj en ĉiuj landoj. Davor Grgat, Z.P.—Krilo-Jesenice, SPLIT, Dalmatio, Jugoslavujo.

Deziras korespondi kun ĉiuj landoj pri diversaj temoj : S-ro Dačo Genof, Str. Miševa, 1, LOVEČ, Bulgarujo.

Ruĝa Kruco. Konferenco-poŝtstampojn de ne-Eŭropaj landoj serĉas : Aderegg-Gurtner, Horn/Bodensee, Svislando.

Profesoro Tôth Lázlon, GOMBA, Pest, Hungarujo interŝanĝas belajn ilustritajn poŝtkartojn, infandesegnaĵojn tutmonde. Skribu ankaŭ al liaj gelernantoj junaj.

Letervesperon, la 15.IX.1955, aranĝas zagrebaj tramistoj. Amikoj, precipe la samfakuloj, ni atendas vian kontakton ! Respondo certa. "Esperanto-grupo ZET" R. Končara 239, ZAGREB V, Jugoslavujo.

Ekspozicion kaj letervesperon, aranĝos Esperantista Societo "La Verda Stelo" en ZRENJANIN (Jugoslavujo) provinco Vojvodino-Banat, komence de la 1-a de oktobro ĉ.j. Ni petas ĉiujn eldonistojn, redakciojn, societojn, klubojn, grupojn kaj opulojn

skribu P.I. kaj sendu Esp. gazetojn, aĵojn amase por pli beligi, riĉigi kaj vastigi la ekspozicion, ke ĝi estu unu grandskala ekspozicio kaj letervespero. Je ĉiuj sendaĵoj ni respondos post la aranĝo.

Dek gelernantoj deziras interŝanĝi bildkartojn tutmonde. Certa respondo. Adreso M. D. Arís, Str. Covadonga 205. Sabadell, BARCELONA, Hispanujo.

Tutmondaj Esp. ligoj, societoj, grupoj, izoluloj ! Ĉu vi jam konas miajn belajn esperantaĵojn, la Esp. ludon Roli, Esp. insignojn el emajlo, pordoŝildetojn Esp. parolata ? Kiam ne, tiam senprokraste postulu mian prezliston. Sendebleco ĉiulanden. Agemaj reprezentantoj kaj revendistoj ĉiulande serĉataj. Skribu al Hans Gruber (13b) POCKING-HAID, Nbay, Germanujo.

Eksporta kaj importa firmo posedanta grandsuman kapitalon kun kontoj en bonekonataj bankoj deziras interkomercadi kun ĉiulandaj importistoj kaj ĉiuj aliaj komercistoj. Serĉas agentojn kaj korespondantojn ĉiulande. Liveradas kian ajn objekton individue. Proponojn kaj enketojn skribu aerpoŝte al nia S-ro Wong Ling Kai, HOP SING HONG, 35 Des Voeux Road West, 1st Floor, HONG KONG.

35 Gejunuloj atendas vian leteron. Al F-ino Matsuura-Hideko, Sakurazuka Higashidôri 5-1, TOYONAKA, Japanujo.

Tute nova, bunta nacia kostumo el Moravia Slovakio por 17-20-aĝa knabino estas interŝanĝota por Esp. libroj laŭ posta interkonsento. La fotografaĵo kaj priskribo estos al ĉiu interesinto sendita. Helpu pliriĉigi kluban bibliotekon en tempo de nepagipoveco al eksterlando. Informojn sendos : Kuznik Jar., Rooseveltova 17, OPAVA, Ĉeĥoslovakujo.

300 div. germ. pm kontraŭ 200 el via lando aŭ 10 respkup. Herbst, Gartenstrasse 24, BRETTEN/Baden, Germanujo.

Serĉata germana sekretariino, kiu parolas Esperanton ! Skribu al Ing. Otto Hast, Gartenstrasse 103, FRANKFURT/Main, Germanujo.

Deziras korespondi kaj interŝanĝi kĉl. pri filatelo, pm., pk. il. pri arto, tekniko, arkitekturo. Ing. Otto Hast, Gartenstrasse 103, FRANKFURT/Main, Germanujo.

Esperanto oficiale instruata ! Sendu gratuleteron al la lernejestro kaj infandesegnaĵojn por grava ekspozicio en novembro. Kontribuantoj ricevos la lernejan revuon ilustritan. Temple School, ROCHESTER, Anglujo.

S-ro K. A. Hakala, LAPPILA, Finnlando, deziras korespondi kun la tuta mondo. Al ĉiuj mi respondos.

Gefratoj miaj ! Elkore mi dankas vin. La respondo al mia anonceto (aprila) estis bonega, tro granda por la persona danko. Grupo nun ekzistas ! Redankon. Frank Scarborough, 6 Bedford St., HULL, Anglujo.

Veraj amulet-rememorigaĵoj de Afriko. Nun estas haveblaj en malgranda kvanto amuletoj, kiuj protektas vin kaj donas al vi bon-sorton, se vi kredas je tio. Unu vera specimeno kaj la forsendado rekte al vi kostas nur 5 ŝil. (brita poŝtmandato) aŭ unu 1 dolar-noton. Aĉetu hodiaŭ, kiam ĉi ankoraŭ estas aĉeteblaj. E. L. Heilberg, KITWE, Norda Rodezio, Centra Afriko.

Memornoto : Kopenhago, 4-11 Aŭgusto, 1956. La bela Unua Bulteno estas preta

kaj senpage ricevebla ĉe : 41-a Universala Kongreso de Esperanto, KØBENHAVN.

ESPERANTOFONO estas la gramofona disko 45 r.p.m., per kiu vi povas lerni bone elparoli Esperanton.

Elparolo de Prof. Dalmau kaj de poeto Vilá.

Mendu tuj kun pago al BELPOST, Apart. 5164, Barcelona (Hispanujo).

Pago akceptata ankaŭ ĉe U.E.A., U.L., kaj "Heroldo."

Prezo : £1 sterlinga, aŭ 1,000 Fr. fr., aŭ 3 usonaj dolaroj.

Atentu ke nur se bonsone eniras Esperanto povas bonsone eliri.

42 urugvajaj E-kursanoj dez. kor. k.ĉ.l. Skribu pk. al : Instituto J. Battle y Ordóñez, Curso de Esperanto, A. Agraciada 2025, MONTEVIDEO, Urugvajo.



Aperis du novaj libroj de la belliteratura serio STAFETO

No. 3. **El la maniko** de Reto Rossetti

Originalaj noveloj kun du detektiv-rakontoj

224 p. 16 × 22.5 cm. kun dukolora kovrilbildo

N-ro 4. **Koko krias jam !** de Ferenc Szilágyi

Originalaj noveloj.

230 p. 16 × 22.5 cm. kun dukolora kovrilbildo

Prezo por ĉiu libro 12ŝ. plus sendokosto

Mendu ĉe U.E.A. aŭ via enlanda libroservo